


人民中國報道

El Populo Cínico

Sept. 1952

9



Por Paco en la Azia kaj Pacifika Regionoj kaj la Mondo

Sung Ĉing-ling

La Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj malfermata en Pekino ĉiseptembre okazos je plej esenca tempo. Hodiaŭ paco ja ne estas ia akademia problemo ĉie en la mondo. Ĝi estas plej sendube urĝa, praktika problemo en tiu ĉi mondparto. Kelkaj militoj estas fakte farataj ĉi tie; Japanio, kontraŭ la volo esprimita de la popolo, estas remilitarigata de Usono kaj refoje preparata kiel bazo de agreso; kruda, senkompata ekonomia kaj politika premo estas metata de la Usona registaro sur certajn Latin-amerikajn kaj Aziajn landojn por ilin enpuĉi en la militan tendaron; Usonaj generaloj daŭre verĉas salon en sian memfaritan naŭzan vundon, plue malhelpante la armistitan traktadon en Koreio, intensigante la kriman bombadon al la maljunuloj, virinoj kaj infanoj en koreaj urboj jam ruinigitaj, aplikante sian t.n. militan premon per bombado al pactempaj instalaĵoj. Tio ĉi estas aldono al ilia jam monte alta listo de abomenaĵoj, kun la pleja fiago ĉe la kapo—la bakteria militado.

La bruteca, agresiva karaktero de tiuj ĉi politikoj en Malproksima Oriento, plus la senprudenteco de lasttempaj agoj de la Okcidentaj potencoj en Eŭropo, precipe rilate al Germanio, jam kaŭzis seriozan malboniĝon en la internacia situacio. Tio ĉi estas cirkonstanco forte maltrankviliganta multajn homojn tra la tuta mondo. Ĉiu sinsekva frapo estas pliiĝinta la alarmon, maltrankvilon kaj indignon kun kiuj ili rigardas la spektaklon. Ĉiu persono vidas la kreskantan minacon al si mem: lia hejmo detruota aŭ liaj amatuloj perdota. Ĉiu patrioto vidas la minacon al sia lando: la ŝanco de subjugo de naturo kaj konstruado de feliĉa vivo por la popolo momente malaperonta en ekbrulo de fajro. Rezulte de tio, por kreskanta nombro da homoj en Oriento kaj Okcidento, prezentiĝis tasko: kiel kontraŭbatali kaj ĉesigi tiun ĉi minacon.

Doni vivon, konstrui, plifeliĉigi—jen estas la ĉefaj misioj en homa vivo. Por ĉio ĉi tio, paco estas la esenca kondiĉo. Sed la paco, kiun ni bezonas kaj tiel arde deziras, devas esti batalakirita. Tion ĉi ni scias. La bandeto de la militemuloj estas obstinaĉaj kaj malrespondemaj. Ili ne povas facile forlasi siajn intrigojn por profito. Kiel ni jam vidis je multaj okazoj, ili neniom pripensas en spitado al la deziroj de la popolo kaj estas pretaj fabriki sian pretekston por milito aŭ ĝia devastigo je ajna momento. Tio ĉi signifas ke la fortoj de paco, la centoj da milionoj da ordinaraj viroj kaj virinoj, nepre devas esti viglatentaj, nepre devas firme rezisti esti kondukataj laŭ la vojo al detruado. Ni nepre devas aŭdigi niajn voĉojn; nia postulo vivi pace kune kun ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj devas transformi en laŭtajn kaj fortajn vortojn. Ni nepre devas



Sung Ĉing-ling

esti aktivaj; kiam la ideoj de paco kaj kunlaboro estas disaŭdigataj en la multaj lingvoj de la multaj nacioj, devas esti mobilizo je ĉiuj flankoj, en ĉiuj landoj. Tio signifas, ke se ni ne volas esti flanken tirataj, trompataj aŭ ĉirkaŭpuŝataj de la malmultaj uloj kiuj volas nin detruiri, do la plejmulto devas sin organizi plue por konservi progreson kaj civilizon.

La graveco de la Packonferenco por la Azia kaj Pacifika Regionoj en tiu ĉi rilato ne povas esti troigita. La 500 delegitoj reprezentantaj 1,600 milionojn da popoloj havas grandegan taskon por surŝultrigi, sed ili ankaŭ havas ŝancon por efektiviĝi tion kio sendube pruviĝos centra faktoro en konservo de mondopaco. Subtenate de la Monda Packonsilo, kiu estas la plej granda movado de sia speco en la homa historio, same kiel de la vaste subtenataj kaj rapide kreskantaj pacorganizoj de diversaj

landoj, la Konferenco estas en pozicio por fari nekompareblan paŝon al unueco por paco tra la plej multnombra loĝata regiono de la tero.

Sintrovas vasta bazo sur kiu tiu ĉi unueco povas esti konstruata; t.e. la granda simileco de kondiĉoj en tiu ĉi mondparto kiu havas gravan influon al kiel oni rigardas pacon.

Paco estas koncepto kun multaj aspektoj por la popolo de Azio kaj Pacifiko. Ĝi signifas pli multe ol la foresto de ĝenerala milito. Nia longa kaj maldolĉa sperto pruvas ke eĉ en tempo kiam ne estis ĝenerala milito, tio neniel aplikigiĝis al la landoj suferantaj la subpremon de imperiismo. Povis esti paco aliloke, sed en niaj landoj imperiismo estis minacanta nian ekziston mem. La plejmulto de niaj nacioj havas glorajn pasintecon, grandan eblecon por riĉa ekonomio, alta nivelo de kultura atingo. Sed imperiismo penis polvigi nian pasintecon; ĝi reduktis multajn sekciojn de nia ekonomio al sufokiĝantaj monokulturoj aŭ simple al provizoj de krudaj materialoj kaj malkara laboro; ĝi koruptis nian kulturon kaj penis ĝin anstataŭigi per la sia. Tio ĉi estas la maniero de imperiismo en tre multaj lokoj en Azio kaj la Pacifiko. Ĝi alportis al ni vastan mizeron kaj malklerecon, teruran imposton en vivoj kaj kruelan malakcelon. Ĝi kolerigis ĉiun el ni senescepte.

Tial, por Aziaj kaj Pacifikaj popoloj paco kaj nacia sendependeco estas tiel intime interligitaj kiel ne distingeblaj. Paco devas esti fondita sur egaleco de ĉiuj popoloj kaj reciproke avantaĝaj traktoj inter ĉiuj nacioj. Tio ĉi estas ebla nur kiam ĉiu popolo administras sian landon sen ekstera interveno, laŭ siaj propraj deziroj kaj por sia plej granda bono. Tio ĉi, siavice, estas intime interligita kun la problemo de paco en kiu ĉiuj nacioj kunlaboras por la plej granda bono de la tuta mondo. kiel ajn diference ili sin regas aŭ administras sian ekonomion.

Tiu ĉi koncepto de paco estas vaste, ĉiuloke akceptita inter la popoloj de Azio kaj Pacifiko. Vi trovos gravajn partojn de tiu ĉi opinio, aŭ la tuton de ĝi en ĉiuj socitavoloj—inter laboristoj, kamparanoj, intelektuloj, oficistoj, komerca kaj industria rondoj. Ĝi jam fariĝis nia fundamenta kompreno pri kiel aferoj status en la mondo hodiaŭ. Oni povas diri ke tiu ĉi kompreno, stimulita de antaŭaj ekzemploj, estas plue kaj nemezureble pliigita de la venkoj de la ĉina popolo.

Ĉinio, iam en sia lastatempa historio, estis aludita kiel la “malsanulo de Azio.” Tio ĉi estis la sento kiun multaj havis pri ni, iuj kun kompato, aliaj kun moko. Devas esti sendube por ĉiu ajn ke hodiaŭ kompato estas maltaŭga, kaj ke moko pruviĝas nur fatala subtakso. Ĉar en mallonga periodo tri jaroj, la ĉina popolo jam levis sian nacion al ĝia justa loko, kiel unu el la gvidantoj de la mondo. Ni jam reakiris nian nacian dignon. Ni jam elforĝis novan potencon. Tiuj ĉi tertremigaj atingoj rezultigis el la sukcesa luktado por sendependeco, el la fakto, ke ni jam proklamis kaj efektivigis popolan demokration. Per tiuj ĉi venkoj, per niaj gigantaj paŝoj en la rekonstruo de nia lando, ni jam starigis novan standardon por la popoloj de Azio kaj Pacifiko. Ni donis al ili novan perspektivon pri iliaj problemoj.

La pliigita prestiĝo, kiun la ĉina popolo nun ĝuas, havas alian kaŭzon—nia senŝancela subteno al paco. Paco estas parto de nia tradicio en konsidero de nia nacio kaj popolo. Tra la miloj da jaroj en kiuj ni ĉinoj havis rilatojn kun la popoloj de Azio kaj Pacifiko, ni neniam agis en militema maniero. En la nuna periodo, paco estas la fundamenta principo de la fremdlanda politiko de nia Popola Respubliko de Ĉinio. Ni jam montris ĉiumaniere ke, ĉe ni, strebado al paco estas serioza afero. En plenumo de la politikoj de nia lando, en la defendo de nia lando kaj la lando de niaj najbaroj, ĉu por organizoj aŭ individuoj, estas ĉiam la serĉo por paco, kiu gvidas kaj direktas niajn agojn.

Ke la popoloj de la Azia kaj Pacifika regionoj rekonas tiun ĉi fakton estas atestite de ilia sendo de reprezentantoj al nia ĉefurbo por fari novan kaj historian paŝon por paco. Pekino, la miksaĵo de la malnova kaj la nova, estis urbo naskita el la unueco de la ĉina popolo. Nun ĝi servas kiel la naskiĝloko de la nova unueco de la Aziaj kaj Pacifikaj popoloj en sia batalo por harmonio inter la nacioj.

Sekve, la Packonferenco por la Azia kaj Pacifika Regionoj estas la rezulto de la ĝenerala tajdo por paco tra la mondo. La reprezentataj popoloj havas solidan bazon por unueco, ĉar paco estas tio kion ili postulas kaj paco kontribuos al la solvo de iliaj propraj naciaj problemoj. Kaj fine, la Konferenco okazos en lando, en urbo kaj inter popolo dediĉitaj al la konservo kaj protekto de mondaĵ trankvileco kaj kunlaboro. La rezultoj estos nepre grandiozaj kaj belegaj.

Ni povas esti certaj ke ĉi tiuj rezultoj estos ege diferencaj de tiuj de alia konferenco kiu ĵus okazis en tiu ĉi mondparto. Mi aludas la kunvenon kiun kunvokis la Usona registaro por formi la t.n. “Pacifikan Konsilon”. En tiu kunveno ili ankaŭ preparolis pacon, sed fakte planis por plua agreso. En tiu kunveno ili parolis pri kunlaboro, kun “postĝintaj” nacioj, sed fakte komencis pliajn planojn por plue sklavigi certajn Aziajn kaj Pacifikajn landojn. En tiu kunveno ili ankaŭ parolis pri egaleco de popoloj, sed fakte la rezolucioj de la nova “konsilo” estos diktataj de unu potenco, la Usona registaro.

Estas nepre necese elmontri ke la politikistoj de Usono kiuj gvidos la konsilon de milito ja neniel reprezentas la popolon de tiu lando. La popolo de Usono, fakte, eĉ ne povis eniri la pordon de tiu kunveno. Tio ĉi estas en akra kontrasto al la maniero laŭ kiu la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj provizos estradon, de kiu povos aŭdiĝi la vera voĉo de la Usona popolo.

Ni sincere esperas ke granda delegacio povos ĉeesti por reprezenti la Usonian popolon. Kiel membroj de Pacifikaj nacioj, usonanoj havos difinitan intereson en tio kion ni decidis, kaj ili povos fari certan kontribuon. La konferenco ankaŭ donos al ili ŝancon sciigi pri tio kion tiu ĉi mondparto pensas. Multaj teruraĵoj estas faritaj en ilia nomo. Ili devas sciigi pri la vero pri tiuj ĉi agoj. Ili devas scii, kaj mi estas certa ke ni povas impresi ilin pri la fakto, ke la popoloj de Azio kaj Pacifiko klare distingas ilin de la veraj farantoj de tiuj fiagoj.

Ni esperas ke reprezentantoj de la Usona popolo povos veni por vidi nin en karno kaj ostoj, por akiri rektan komprenon pri la novaj disvolviĝoj kiuj okazas. Ni volas certigi al ili ke estas nenia minaco al ili aŭ ilia vivmaniero fare de ni aŭ de iu ajn el la landoj kie la popolo regas. Ni pensas ke ni povas pruvi al ili ke la minaco estas interne de ili mem, ke ilia malamiko kaj la nia estas unu, kaj la sama. Ni volas la Usonian popolon scii ke estas multaj kialoj ke ni devas kunlabori kiel popoloj kaj nacioj, sed estas eĉ ne unu kialo ke ni devas interbatali.

Kune kun la Usona popolo, ni popoloj de Azio kaj Pacifiko volas respondi la demandon: “Kiu profitas el la batalo en Koreio, Vietnamo kaj Malajo, el la unuflankaj kontraktoj kiuj tenas aliajn landojn kiel koloniojn, el la rearmado, el la limigo de komerco kaj kultura interŝanĝo?” Kune kun ili ni volas eltrovi la veran interrilaton inter la fakto ke Usonaj korporacioj enpoŝigis profiton de 44.8 miliardoj da dolaroj en 1951, okoblo de la pactempa cifero antaŭ la Dua Mondmilito, kaj la fakto ke triono de ilia nacia enspezo estas englutegita de impostoj, kaj de la mortigado, kripligado kaj detruado kiujn ilia registaro senbridigas en la Malproksima Oriento. Ni scias la rektan interrilatecon inter tiuj ĉi aferoj, kaj ni pensas ke la reprezentantoj de la Usona popolo konsentos kun ni.

Alivorte, ni kaj ili, kaj ĉiuj pacamaj popoloj alfrontas komunan malamikon, la plenmanon da obstinuloj kiuj profitas el milito. En la batalo kontraŭ tiu ĉi malamiko, por nia ekzisto kaj por paco, la popoloj de Azio kaj Pacifiko rigardas la popolon de Usono kunbatalanto, grava kunbatalanto. Ni esperas ke ili aliĝos al ni kun sia tuta forto. Ni esperas ke ili aliĝos al ni en kreado de la paco, kaj poste en la laboro fari la mondon loko de fruktodona laboro kaj ĝojo, sekura kaj solida loko por iliaj infanoj kaj la niaj. Ni manpremos kun ili en tiu ĉi plej granda el krucaj militiroj, por fari tiun ĉi nian epokon unu el la plej belaj epokoj en la monda historio.

Kunlaborante ĉe la Packonferenco por la Azia kaj Pacifika Regionoj, la reprezentantoj de dudek nacioj elforĝos la unuecon de ĉiuj raso, koloroj, kredoj kaj religioj por paco! Kune ni metos la fundamenton por la partopreno de Aziaj kaj Pacifikaj popoloj en la eksterordinara Kongreso de la Popoloj por Paco en venonta decembro! Kune ni faros gigantajn paŝojn al gajno de la mondo por la popolo!

Opaĉjo Volas Reguligi la Konton

—El notoj en Panmunĵom de Tien Kien, fama poeto de popola Ĉinio—

Nun, kiam mi skribas tiun ĉi rakonton, la suno estas brilanta super la kapo, kaj la tempo ĝuste je la tagmezo, kaj sur la monteto apude de la vilaĝo, en la freŝverda pinaro, ĉe la ombrelformaj pinoj sin paŝtas bovoj kaj ĝoje ludas infanoj.

Sur la kapo de Omanjo* sidas akvokruĉo† kaj en la mano de Opaĉjo troviĝas falĉilo. Ili iros labori en la kampo. Suririnte la monteton ili ĵetas rigardon al Panmunĵom, al la tendo, kie troviĝas delegitoj de armistika interparolo. Eklevante la falĉilon kaj montrante per ĝi la tendon Opaĉjo diras indigne:

“Ankaŭ mi volas iri en la tendon!”

“Kioĉ vi volas fari tie?”

“Ankaŭ mi volas partopreni la armistikan interparolon.”

“Sed kiel?”

“Mi portos la atestaĵojn: rompitaĵajn ŝelojn de 80,000 obusoj kaj tie reguligos la konton kun la Usonaj banditoj kaj devigos la fiulojn rekonstrui nian vilaĝon!”

Oh, Koreio, tiu ĉi majesta lando! Mi ĝin amas, kvankam ĝi fariĝis jam ruino. Mi pensas, ke eĉ se mi verŝus mian sangon sur ĝia tero kaj kuŝus eterne kune kun la pinoj tie ĉi mi same plezuris.

Mi sidas en la kabano. Malferminte la pordon mi rigardas la kampojn de la amika lando, la postenan tendon ĉe la kordono kaj la sovaĝajn florojn tie floran-tajn. Mi krias en la koro: “Vivu Koreio! Vivu la pacobatalantoj! Vivu la Ĉinaj Volontuloj! Vivu Generalo Kim Il Sung!”

Mi tenas plumon en mia mano, mi volas kanti Koreion, mi volas kanti niajn delegitojn en la tendo de Panmunĵom, kaj mi volas kanti la pacobatalantojn. Se mi ne plu povus tion kanti per la plumo en la mano, mi do ĝin skribus per mia propra sango!

Hieraŭ vespere apud tiu ĉi kabano, sub la tegment-rando mi trovis tri kuglingojn. Por ke mi kaj multaj aliaj amikoj ne forgesu la ŝuldon, mi ilin metis sur la tablon, kaj krome, apud vazo da freŝaj floroj. Mi volas pristudi la demandon: Milito kaj Paco.

Mi ne estas armeano. Tamen ankaŭ mi povas bone distingi ke tiuj ĉi tri kuglingoj estas forlasitaj de la Usonaj aeroplanoj dum la pafado.

Antaŭe Ĉungkutung estis loko en la neŭtrala regiono. La etendo de la neŭtrala regiono iom ŝanĝiĝis depost kiam la kunvenejo de la armistika interparolo translokiĝis al Panmunĵom. Tamen ĝi restas ankoraŭ proksima de la kunvenejo. Mi loĝas tie ĉi kaj ĉie mi povas trovi la Usonajn kuglingojn tiel facile kiel mi povas trovi ŝtonetojn sur la tero. Kaj, trans Panmunĵom el la kontraŭa flanko senĉese alvenas sonoj de kanonado, ke la pordo kaj fenestroj de tiu ĉi kabano krakadas pro tremado.

Kiam mi volas daŭrigi la skribadon tenante la plumon kaj fiksante miajn okulojn sur la tablon, subite aperas kelkaj lernejoj geknaboj ĉe la pordo. Ili estas niaj fratetoj kaj fratinetoj. Ili denove sendas al mi florojn. Ili diras ke tio estas ilia donacaĵo. Mi al ili dankas:

“Tiu ĉi donacaĵo tre plaĉas al mi.”

“Morgaŭ ni alportos al vi pluan.” diras ili ĉiuj.

La geknaboj enmetas la florojn en la flurujon kaj min demandas palpante la tri kuglingojn:

“Ĉe vi nur troviĝas tri?”

Mi kapjesas. Unu el ili, kiu kapablas kanti dek ĉinajn kantojn, diras:

“En nia vilaĝo oni povas kolekti 30,000 tiajn kuglingojn.”

“Ni malŝatas ilin!” diras ili ĉiuj.

“Ni malŝatas ilin, ĉar ili povas fariĝi nek floro nek libro, kontraŭe ili plene ruinigis nian vilaĝon!” daŭrigas la knabineto.

“Ĉu via vilaĝo ne estas en la neŭtrala regiono?” mi ŝin demandis.

“Antaŭ kelkaj monatoj ĝi ja estis en la neŭtrala regiono,” ŝi respondis.

“Kie vi nun loĝas?”

“La vilaĝo estas ruinigita en la bombardado, ni nun loĝas sub la tero.”

“Sub la tero?—Vi diris ‘sub la tero?’” mi ankoraŭ ne bone komprenas ŝiajn vortojn.

Ŝi min kondukas eksteren kaj montras al mi la monteton, kie post amaso da ruinaĵoj, estas aero-defenda tranĉeo. Ŝi diras ke ŝia tuta familio, kiel la batalantoj, loĝas tie, najbare kun la volontuloj kaj sekve estas ilia najbaro. Ŝi plurfoje ĝoje al mi ripetas:

“Ankaŭ al onĉoj volontuloj mi alportis freŝajn florojn.”

“Tiu ĉi donacaĵo tre plaĉas al mi.”

“La Usonaj diabloj tiel multe kanonadis, ili ja volas ke ni transloĝiĝu.”

Sed la knabineto firme anoncas: “Ni neniam transloĝiĝos, eĉ la morto nin ne fortimigos. La vilaĝo estis ruinigita sub la bombardado, tamen ni ankoraŭ loĝas ĉi tie. Opaĉjo ĉiutage rigardas sur la monteto la tendon kun falĉilo en mano. Li diris ke li volas kolekti ĉiujn kuglingojn kaj ilin portos al la tendo en Panmunĵom por reguligi la konton kun la Usonaj diabloj, ke ili redonu al ni la vilaĝon kaj rekonstruu ĉiujn domojn de ili detruitajn. Alie ni ilin bone batos. Opaĉjo diris ke li estas forta, ke lia forto estas tre granda. Nun ni neniam transloĝiĝos. Se tio iam okazos, tiam estos la transloĝigo de sub la tero al novaj domoj.”

Mi diras al ili: “La popoloj tra la tuta mondo volas reguligi la konton kun la militprovokantoj kaj volas la pacon. Stalin, Maŭ Zetung kaj Kim Il Sung nun ja pensas kiel vin transloĝigi el sub la tero al la ĉielo, rekonstrui paradizon sur la ruinoj kaj tie iam vin ĉiujn enloĝigi, kaj tie publike juĝos la militprovokantojn kaj ilin pendigos sur la eŝafodo. Penu do vi ĉiuj! Viajn vortojn mi ĉiam memoros. De nun mi surprenas sur min tra la tuta vivo la devon akuzi la Usonajn murdistojn kaj defendi la tutmondan pacon en la porpacaj libroj!”

—elĉinigiis Zekun.

* “Opaĉjo” signifas “Paĉjo” kaj “Omanjo” signifas “Panjo. En Koreio kutime oni tiel vokas alies patron kaj patrinon same kiel la siajn.

† La koreinoj kutime portas aĵojn sur la kapo.

Komenciĝo de Grandskala Ekonomia Konstruado en Nordorienta Ĉinio

Ĉijare la stadio de industria rekonstruado en Nordorienta Ĉinio finiĝos fundamente, kaj sekve de la nuna komenciĝo de la gravpunkta, laŭplana, grandskala ekonomia konstruado la fundamenta konstruado jam leviĝis al la plej grava pozicio en ekonomia konstruado. Tio ĉi estas granda sukceso akirita en la tri pasintaj jaroj de la laboristoj en Nordorienta Ĉinio sub la prava gvidado de Prezidanto Maŭ, de la Centra Komitato de Ĉina Komunista Partio kaj ĝia Nordorienta Buroo, kaj ankaŭ estas historia grava ŝanĝo post kiam la tuta partio de Nordorienta Ĉinio, korekte plenumante la rezolucion de la Dua Kongreso de la Centra Komitato de Ĉina Komunista Partio, transigis de la kamparo en la urbon la ĉefpunkton de partia laboro.

Dum la tri pasintaj jaroj, la ĉefpunkto de la gvidado de la Nordorienta Buroo de la Centra Komitato de Ĉina Komunista Partio por industriaj kaj minaj entreprenoj estis restarigi kaj organizi produkton. Fundamenta konstruado estis metita sur la duan, suban pozicion. Antaŭ la liberigo, pli ol 80% de la instalaĵoj de fabrikoj kaj minoj de Nordorienta Ĉinio estis serioze detruitaj de japanaj imperiistoj, naciperfiduloj kaj de Kuomintang, kaj krome en la koloniecaj entreprenoj, malnovaj administraj sistemo kaj metodo malhelpis la disvolvon de produktforto en la komenca periodo post la liberigo. Por restarigi kaj organizi produkton, la Nordorienta Buroo de la Centra Komitato de Ĉina Komunista Partio revokis el diversaj laborpostenoj grandan nombron da partiaj kadroj, kaj asignis al ili postenojn de fabrikestro, direktoro kaj aliajn administrajn oficojn aŭ partian kaj popolamasan laboron por ke ili lernu administri industrion.

Dank' al bona amaslaboro inter la laboristoj kaj oficistoj la gvidantaj kadroj asignitaj de la Partio senĉese disvolvis la restarigan laboron de industria produkto per mirinda rapideco. En 1949, la unua jaro de restarigado, la rapideco de rekreskigo de diversaj industriaj produktkvantoj jam superis tiun de reinstalado. Tiam, la reinstalado sukcesis nur reekipi la ferfandan industrion je 25% de la plej alta ekipo dum la Manĉua pupa regado, tamen la produktkvanto de fanda fero pliiĝis ĝis 42.2%; spindeloj nur restarigis je 66%, tamen la produktkvanto de ŝpinaĵo pliiĝis ĝis 143%. En la jaro 1950, la tuta produktita valoro de ĉiuj fabrikoj kaj minoj apartenantaj al la Industria Departemento de la Nordorienta Popola Registaro plimultiĝis je 135.6% kompare kun tiu de 1949; refunkciigitaj fabrikoj kaj minoj plimultiĝis je 34.3% de tiuj ĝis la fino de la jaro 1949, t.e. ĉiuj fabrikoj kaj minoj kiuj povis kaj necesis esti restarigitaj jam refunkciis. En la jaro 1951, la tuta produktita valoro de la ŝtataj industrioj de Nordorienta Ĉinio pliiĝis je 24.1% kompare kun tiu de 1950. Kalkulite laŭ fiksa prezo, la produktkvantoj de ĉiuj ĉefaj industrioj, kiel tiuj de ŝtalo, fero, karbo, elektro, maŝino, koloraj metaloj, ĥemio, ŝpino kaj tekso, papero, gumo, vitro k.t.p., plejparte jam alproksimiĝis aŭ superis la plej altan produktnivelon dum la Manĉua pupa regado. Laŭ la ekonomia plano de Nordorienta Ĉinio, en la jaro 1952, la tuta produktvaloro de ŝtata industrio plimultiĝos je 41.5% kompare kun la tuta produktvaloro de la jaro 1951. Post kiam la plano estos plenumita, la produk-

tokvanto de Nordorientaj industrtoj (inkluzive la privatajn industriojn) dekprocente superos al plej altan produktokvanton dum la Manĉua pupa regado. Tia rapideco de industria disvolviĝo neniam aperis pasinttempe aŭ nuntempe en kapitalistaj landoj tra la mondo.

Dum la tri pasintaj jaroj, en administrado kaj direktado, la produktaj institucioj de Nordorienta Ĉinio trapasis demokratian reformon, lernadis pionirajn spertojn de Sovetunio kaj starigis novajn sistemojn de administrado, sekve de kio jam efektiviĝis unuapaŝaj laŭplana administrado kaj sistemo de ekonomia kalkulo, kaj starigis kaj plifortiĝis la politika laboro en entreprenoj, kaj la malnovaj entreprenoj estas jam transformitaj en novajn popolajn entreprenojn. Dum tiu ĉi reformado, la Partio faris malsaman aranĝon laŭ la malsama situacio de ĉiu periodo. Post la transpreno, de la malnovaj entreprenoj, la fabrikoj kaj minoj faris unuapaŝan demokratian reformon. Tio fortigis al la laboristoj kaj oficistoj la respondecan senton de mastroj ke ili produktis kun nova laborsinteno. Sed tiutempe, produktado estis ne normala. Spertoj pri organizado kaj administrado de industrioj mankis al la kadroj kaj sekve de tio malŝparo de homforto kaj materialo fariĝis la ĉefa problemo. Por solvi tiun ĉi problemon, la Nordorienta Buroo de la Centra Komitato de Ĉina Komunista Partio, kaj la Industria Departemento de Nordorienta Popola Registaro alvokis, en 1949, ĉiujn fabrikojn kaj minojn disvolvi amasan movadon por krei novajn rekordojn, ke ĝi funkciu kiel la ĉefa rimedo por kontraŭbatali malŝparon kaj efektiviĝi budĝetan kontrolon. Dum kvin monatoj aperis pli ol 50,000 kreantoj de nova rekordo; la novrekorda movado frakasis la fabelon pri la t.n. nesuperebla nivelo dum la Manĉua pupa reĝimo kaj la malnova teoria normo. El la movado oni komencis lerni kiel fiksi novan racion produktonormon kaj ĝi kreis favoran kondiĉon por detale kaj laŭplane administri produkton. En la novrekorda movado oni ankaŭ malkovris kaj malkaŝis multajn mankojn en produkta organizo kaj administra sistemo, el kiuj, la plej fundamenta kaj la plej ĉefa estis tio ke neniu prenis sur sin respondecan en administrado kaj bone observis la produktan disciplinon. Tial en februaro de la jaro 1950, la Partio alvokis ĉiujn fabrikojn kaj minojn starigi produkto-respondecan sistemon, kaj per tio instigi produkton kaj firmigi la atingojn de la novekorda movado.

La supre diritaj aranĝoj estis ĉefe por solvi produktan problemon, kaj la plejmulto de la fabrikoj kaj minoj ankoraŭ ne faris sistemajn aranĝojn por racie uzi kapitalon en produktado, enkonduki kontroladon de produktokosto kaj tekniko, kaj popecan salajrosistemon, sekve aperis la situacio ke administra kaj direkta laboroj postlasiĝis al produkta laboro. Por ŝanĝi tiun ĉi situacion, la Nordorienta Buroo de la Centra Komitato de Ĉina Komunista Partio kunvokis la Konferencon pri Industriaj Laboroj kiu decidis ke la plibonigo de la administra kaj direkta laboroj de industrio estu la ĉefa rimedo por solvi la tiamajn problemojn de alta produkta kosto, malbona kvalito, multa malŝparo. Ĉiuj fabrikoj kaj minoj disvolvis postparon movadon de kontrolado pri la kvalito de produktajtoj en la komenco de la jaro 1951. Per tiu ĉi movado,

laboristoj kaj oficistoj starigis ideon pri kvalito kaj plibonigis teknikokontrolan kaj aliajn sistemojn. Sur la bazo de tiu ĉi movado, en la dua duonjaro de 1951, disvolviĝis senprecedence granda movado por pliprodukti kaj ŝpari egalvaloron de 5,000,000 tunoj da greno per elfoso de industria kaŝita energio kiel ĝia ĉefa rimedo. Tra la movado, la kontrolado de tekniko, financo kaj produktokosto de ĉiuj fabrikoj kaj minoj estis multe plibonigitaj; kaj tiujn ĉi administrajn sistemojn oni komencis disvastigi en ĉiuj laborejoj kaj ŝaktoj por ilin pliprofundigi kaj firmigi. Samtempe en la movado, oni kreis kaj lernis multajn antaŭirantajn produktajn spertojn kaj labormetodojn, kaj nova aspekto estis alportita al la laboroj por plialtigi laborproduktan procenton kaj plibonigi administron kaj direktadon. Precipe post la granda movado de tri kontraŭoj*, ĉiuj fabrikoj kaj minoj elpelis koruptajn alproprigulojn, serioze kritikis burokratisman sintenon, la laboristoj kaj oficistoj sin purigis de burĝaj ideologio, kaj la politika atmosfero en la entreprenoj plivigliĝis. Sekve de tio la breĉoj de diversaj administraj sistemoj, kiuj malkovriĝis en la movado de tri kontraŭoj, estas ŝtopitaj iom post iom per efikaj aranĝoj, kaj la administraj laboroj estis plie bonigitaj.

Sur la bazo de la restarigado de industria produkto en la pasintaj tri jaroj, Nordorienta Ĉinio komencis ĉefpunktan, laŭplanan kaj grandskalan ekonomian konstruadon, kaj fundamenta konstruado jam estas metita en la plej grava pozicio.

En la tri pasintaj jaroj, la proporcio de nova konstruado en fundamenta konstruado de Nordorienta Ĉinio pligrandiĝis paŝon post paŝo. En la ŝtata investado de la Industria Departemento de Nordorienta Ĉinio en la tri pasintaj jaroj, tiu ŝanĝiĝo estas klare

videbla. En la jaro 1949, 75% de la kapitalo estis uzita por restariga laboro, kaj 25% por novkonstrua laboro (inkluzive de reformado, same en la sekvanta teksto); en la jaro 1950, 38% por novkonstruado; en 1951, por la sama laboro estas 80%; kaj laŭ ĉijara plano, 90% estos uzata por novkonstrua laboro. La kreskanta proporcio de investado en novkonstrua laboro montras ke la disvolviĝo de la industrio de Nordorienta Ĉinio jam komencis marŝi de la stadio kies ĉefa tasko estas restarigo de produkto en la stadio kies ĉefa tasko estas fundamenta konstruado. La Nordorienta Buroo de la Centra Komitato de Ĉina Komunista Partio donis instrukcion lasttempe al ĉiuj industriaj administraj organizoj ke oni koncentrigu, sen malutili produkton, multnombro da kapablaj kadroj, teknikistoj kaj teknikaj laboristoj, de sur produktaj postenoj al fundamenta konstruado, kaj fari la organizojn de fundamenta konstruado la plej fortaj el la industriaj organizoj. Samtempe diversaj fakaj organizoj por fundamenta konstruado, ekzemple fakoj de geologia esplorado, projekto, financo, provizo de materialo, prizorgo de instalaĵoj, salajro k.t.p. devas esti starigitaj paŝon post paŝo. La Nordorienta Buroo ankaŭ ordonis al ĉiuj konstruaj entreprenoj ke ili nepre efektive la sistemon de ekonomia kalkulo, disvastigu antaŭirantajn labormetodojn kaj laborspertojn, disvolvu patriotisman movadon de ŝparo kaj pliprodukto. Nun ĉiuj organizoj estas penegite fortigantaj la gvidadon al la laboro de fundamenta konstruado laŭ la instrukcio de la Nordorienta Buroo.

Tradukis Jang Theing

* *Kontraŭ korupta alproprigo, kontraŭ malŝparo kaj kontraŭ burokratismo.*

Ĉinio Forigos Senlaborecon

Plena enokupigo estos atingita en Ĉinio paŝon post paŝo en la venontaj jaroj. La registaro jam decidis helpi la plej grandan nombron da longantoj en urboj partopreni en la venonta grandskala ekonomia konstruo laŭ lasttempa decido de la Registara Administracia Konsilo.

Pli ol 2,200,000 senlaboruloj trovis laboron en la pasintaj tri jaroj kiam la proporcio de industria produkto pliampleksiĝis de 10 ĝis ĉirkaŭ 30 procentoj de la nacia ekonomio. Estas ankoraŭ akra manko de spertaj laboristoj, teknikistoj, instruistoj, k.t.p. en la lando.

Granda nombro da teknikaj institutoj kaj profesiaj lernejoj jam starigis por trejni lertajn laborulojn en ĉiuj kampoj. Junaj registaraj laboruloj kaj mez-lernejaj gradiĝintoj estas jam registritaj por respondi la plivastajn bezonojn de la ŝtato. Mallongdaŭraj trejnaj kursoj estos malfermitaj en fabrikoj por altigi la teknikan kaj edukatan nivelon de laboruloj preparantaj por plimulte da mekanika produkto.

Labor-trejno estos donita al nombro da lernejoj gradiĝintoj inkluzive de multe da dommastrinoj, kiuj ne povas trovi laboron, ĉar ili lernis nenian metion antaŭ liberigo. Post trejno, ili povas sin okupi en instruado, en afero de publika sano, kooperativoj, k.t.p.

En la formorto de kelkaj profesioj inkluzive opio-fumejon, vetludejon k.t.p. kiuj servis al la

parazitaj postuloj de la privilegiuloj en la malnova socio, la laborintoj en tiaj okupoj, ankaŭ ricevos laboron trejnita, por ke ankaŭ ili povu partopreni en la konstrua laboro.

Speciala komitato estos starigita tra la tuta lando por solvi la problemon de konvena allokigo de homo-forto. Al ĉiuj, kiuj volas trovi laboron, estos donita la oportuno por registriĝi ĉe la registaro. Ĉinoj revenintaj el fremdaj landoj, ricevos specialan prizorgon de la registaro, kiu helpos ilin trovi la konvenan laboron.

Komentariinte la registaran decidon, la *Popola Tagjurnalo* en Pekino rimarkis: "Nun la kondiĉo por solvi la problemon de senlaboreco estas multe pli favora ol antaŭe, ĉar la nacia ekonomio de Ĉinio jam progresis el la etapo de restatiĝo al ekspansio. La grandskala konstrua laboro baldaŭ komencota bezonos vastan labor-forton. Estas klare ke ju pli granda estas la homo-forto des pli bona, kiam Ĉinio entreprenas la novan demokratian konstruon kaj antaŭeniras al socialismo."

"Kapitalismo", la ĵurnalo aldonis, "ne povas solvi la problemon de senlaboreco. Sub tia sistemo, senlaboreco, kontraŭe, fariĝas la preteksto de la monopolaj kapitalistoj por perforte eldevigi superprofitojn kaj efektive imperalistan agreson eksterlande. Ilia absurda teorio de 'superpleno de loĝantaro' montriĝis tute sensenca".

W. S. Ho

UNU TAGO EN AKOMPANO DE MONICA FELTON EN PEKINO

Ŝiaŭ Ĉien

Survoje de la Pekina Hotelo kie ŝi loĝis al la Tungtan-bazaro — populara komerca centro por la najbaraj dommastrinoj ni babilis kvazaŭ ni estus sur la tegmento de homa vivo—pri la urgaj problemoj de paco...la perspektivoj de la korea armistica konferenco...la kreskanta pac-movado en okcidenta Eŭropo. Ekbrilis ŝiaj griz-blauaj okuloj kaj ŝi diris kolere, "Escepte se la Usona registaro decidus daŭrigi la korean militon ĝis kiam ili pretigos sin por mondskala milito, estas neeble klarigi la frenezajn agojn de la Usona aerarmeo kiu sendistinge bombadis Ĉinion kaj Koreion."

Tuj kiam ŝi paŝis en la bazon ŝiaj okuloj brilis pro nova intereso. Ŝajnis ke ŝi, post momento, malsupreniris per rapidega lifto for de la tegmento de homa vivo al la ordinara teretaĝo de ĉiutagaj laboroj. S-ino Felton, gajninto de Stalin-premio amata de ĉiuj popoloj en la mondo, estis ankaŭ S-ino Felton, Londona dommastrino. Kvankam ŝi ne kunportis korbon kiel la aliaj dommastrinoj, ŝi tute senĝene interrilatis kun ili kiuj sin okupis pri sia dimanĉa aĉetado. Ankaŭ la Pekinaj famili-estrinoj ne surpriziĝis trovante meze de si Eŭropan virinon kun blondaj haroj kaj blankepunktita, blua silk- robo.

En la unua vico da manĝaĵoj elmontrita ŝi trovis plenkorbojn da kokaj, anasaj kaj kolombaj ovoĵoj. Klientoj elektis kaj elektadis kaj kalkulis la ovojn po dek. S-ino Felton esprimis la ĝoj-surprizon de dommastrino vidante tiujn brilantajn, bone-aranĝitajn ovojn aĉeteblajn en ajna kvanto.

Ĉe la legom-budoj ŝi rekonis multajn, familiarajn legomojn kaj fruktojn, brasikojn, spinacojn, celeriojn, asparagojn, terpomojn, kukumojn, pomojn, ananasojn, bananojn, melonojn, persikojn, prunojn... Ili ŝajne malplilongigis la distancon inter Pekino kaj Londono. Ŝi tre ĝojis trovante la florbrasikojn kaj tomatojn kiujn ŝi ege ŝatis—tomatojn en sezono kiuj kostis malpli ol unu pencon po funto.

Unu fiŝ-budo altiris ŝian atenton. Ŝi rigardis scivoleme la nigrajn angilojn kiuj serpentumis en ligna kuvo. Estis multaj specoj da fiŝoj, kelkaj blankkorpaj, kelkaj skvamaj, kelkaj ostaj kaj kelkaj molaj kaj glataj. Ĉiu tipo kunportis etiketon kun siaj nomo kaj prezo. En korbo senĉese rampis grizaj kraboj.

Nun pluvus ekstere. Gutoj da pluvo batis sur la plumban tegmenton de la bazaro. Akvo kuris rapide suben tra la defluiloj. La trairejoj pli kaj pli pleniĝis de homoj. Estis kelkaj terkulturistoj el la ĉirkaŭurbo portantaj kun si balailojn, brosojn kaj aliajn metiajn produktojn por vendado. Por S-ino Felton ĉio estis treege interesa.

Mez-aĝa, sperta dommastrino venis al la fiŝ-budo kaj la juna, sunbrunigita fiŝ-vendisto ofertis al ŝi sian servon, kun akra tranĉilo en la mano. Ŝi montris al li kie tranĉi la ventron de la fiŝo kiun ŝi elektis kaj kiel forigi la ostojn. Ŝi povis diri ekzakte kiu parto estas delikata kaj senosta. Mi vidis ke S-ino Felton deziras diskuti kun ŝi tiun ĉi dommastrinan arton, sed ili faris nenion ol rideti unu al alia en silenta amikeco.

La fiŝ-vendisto, sin turninte al la ligna kuvo elprenis perĉon du futojn longan. Li premis la brankojn

per siaj du fingroj kaj la ruĝa buŝo de la fiŝo malfermiĝis kaj montris sian freŝecon al S-ino Felton.

"Kiom bedaŭrinde," diris ŝi ĉagrene, "ke mi ne havas kuirejon ĉi tie en Pekino."

Ni venis al budo ĉe kiu pendis dekoj da kokoj kaj anasoj senplumigitaj kun kapoj malsupren kvazaŭ stalaktitoj en kalkŝtona kaverno. S-ino felton rigardis atenteme dum iu virino faris sian elektadon.

"Kial vi preferas tiun ĉi ol tiun?" demandis S-ino Felton.

"Rigardu," la virino diris prenante la kokon kiun ŝi elektis kaj pinĉante la kruron per siaj fingroj, "Tio montras al vi ĉu la kokaĵo estas delikata aŭ ne."

S-ino Felton kapjesis kompreneme.

Ii preterpasis la viand-budon kun tranĉaĵoj de bovajo, ŝafajo kaj porkaĵo kaj grandaj emajlitaj pletoj da renoj, hepatoj, koro, langoj kaj ĉerboj. En pli kvieta angulo ni vidis la ĉarmajn botelojn kaj korbojn de la herb- kaj spic-vendistoj kaj multajn frandaĵojn por nia gasto nekonatajn.

Kiam ni atingis la sekcion de kaniigitaj manĝaĵoj ĉe la flanko de la bazaro, ŝi turnis sian atenton al la sekigitaj akvokonkuloj kaj kaniigitaj bambuidoj sur bretoj kaj la salitaj fiŝoj sur la muroj. Dum ni foriris ŝi ĵetis sian lastan aproban rigardon al tiu granda amaso da manĝaĵoj kiuj estis tie por la elektado de la Pekinaj dommastrinoj. Ili neniam ĉagreniĝas pri manĝporcioj aŭ pri manko de esencaj manĝaĵoj kaj ĉio estas aĉetebla laŭ justa prezo kaj tuj liverebla.

Poste ni iris al la Pekina Meti-produkta Vendejo apud la Hatamen-pordego. S-ino Felton—kaj kiu ne faras la samon? — tuj esprimis sian ravon pri la arto kiun montris ĉinaj meti-laboristoj. Ŝi aparte preferis la "ok feojn" kaj janko-dancantojn faritajn el eburo kaj la lakitajn varojn kun desegnoj el la famaj Tunhuang-freskoj. Ŝi aĉetis klaŭzonan cigared-cindrujon kun Tunhuang-desegno. Ŝi memoris ke ŝi vidis la ekspozicion de ĉina arto okazigitan en Londono en 1936 kaj vizitis ĝin kelkfoje.

Inter ĉiuj tiuj trezoroj tio kion ŝi plej longe rigardis estis la bele brodita portreto de Maŭ Ze-tung. Ŝi fiere sciigis al mi ke la ĉinaj studentoj kiuj iris al Britlando lastaŭtune donacis al ĉi similan silkbroditan portreton de la ĉina popola gvidanto, kiun ŝi pendigis en sia apartamento ĉe Westminster.

Ni estis sur nia vojo al la Ŝtata Magazeno en Vangfuking-strato. Dum irado ŝi parolis pri la plialtiĝanta viv-nivelo de la popolo, kiun ŝi vidis en Moskvo. La Sovetiaj virinoj sin vestis laŭmode. Ili plej ŝatis ĉinan silk-teksaĵojn. Oni sciigis al ŝi ke foje ĉina veluro alvenis en Moskvo kaj ĝi estis elvendita en malpli ol unu semajno. En Moskvo ŝi manĝis fruktojn el Izraelo. Pripenseme ŝi diris: "Kiel bonege estus se ni povus libere negoci unu kun alia!"

Por eniri la ŝtatan magazenen en dimanĉa mateno oni havas okazon por montri sian persistemon. Laboristoj, studentoj, registaraj laborantoj kaj popolaj armeanoj sin puŝis al la pordoj kaj montrotabloj kie vestoj, skribilaroj kaj cigaredoj estis vendataj. S-ino Felton colon post colo movis sin antaŭen.

Apogante sin al la manĝaĵo-montrotablo ŝi zorgeme rigardis la diversajn specojn de kaniigitaj manĝaĵoj elmontritaj sur bretoj. Ŝi aparte atentis la diversajn specojn de laktpulvoro ambaŭ enlande farita kaj importita. Ĉe teksaĵo-montrotablo ŝi elektis tri vizaĝtukojn. Ŝi elprenis 20,000 juanojn kaj la komizo donis al ŝi la restantan monon—kelkajn monbiletojn. Kiam ŝi kalkulis la prezon laŭ angla mon-sistemo kaj trovis ke ili kostis malpli ol kvin ŝilingojn, ŝi surprize kriis, "Ha, mi devus pagi trioble la prezon se mi estus en Oxford-strato."

Mi demandis ŝin kial vizaĝtuko estas tiel karaj en tia lando kia Britio kiu estas bone konata pro sia teksa industrio. "Sendube kaŭze de la fakto ke la ekonomio de la lando estas malordigita pro rearmado kaj negoca limigado sub Usona premo... Iam estis serio da artikloj por hejma uzo, kiel viŝtuko, kiuj estis klasifikitaj kiel 'utilaĵoj' kaj liberigita de aĉet-imposto. Nun tio estas ankaŭ nuligita kaj la vivo de la malriĉuloj fariĝas des pli malfacila."

"Ĉu Tiu Ne Estas S-ino Felton?"

"He, ĉu tiu ne estas S-ino Felton?" iu flustris meze de la amaso. Ŝi estis rekonita ĉar la antaŭan tagon la Kuangming-jurnalo en Pekino publikigis raporton pri intervjuo al ŝi kune kun ŝia portreto.

Tuj post kiam ŝi estis trovita, homoj iom post iom turnis siajn okulojn de la montrotabloj al tiu ĉi eminenta gasto. Multaj manoj etendiĝis super la ŝultrojn de aliaj homoj penante atingi ŝian manon.

"Kiel vi fartas, pac-batalantino?"

Ĉirkaŭ dek popolaj liberigaj armeanoj estis elektantaj fontplumojn. Aŭdinte la nomon de S-ino Felton, ili suprenlevis siajn kapojn. Ili demetis la fontplumojn kaj ankaŭ etendis siajn manojn unu post alia kaj varme kaptis la ŝiajn. Iliaj firmaj okuloj ŝajnis diri:

"Ni ĉiuj kune laboras por la sama celo defendi pacon. Ni certe sukcesos!"

S-ino Felton konsideris tion karega momento. Ŝi premis la manojn de tiuj defendantoj de la popolo. Rigardante iliajn junajn optimistajn vizaĝojn per siaj griz-blauaj, pripensemaj okuloj, ŝi ŝajne respondis:

"Jes. Helpe de tiaj homoj kiel vi kiuj konas internacian amikecon kaj amas pacon, paco certe triumfos."

Elirante el la ŝtata magazeno mi demandis ŝin ĉu la magazenoj en Londono estis tiel hom-plenaj en semajnofino. Ŝi respondis, "Mi deziras ke ili estu tiel, sed fakte ne—al la popolo mankas mono por aĉeti."

Nun pluvis fortege. Sed malgraŭ tio multaj klientoj venis el la magazeno al la trotuaro por adiaŭi ŝin. Momenton ŝi staris ĉe la kovrita enirejo de la magazeno. Ŝi estis tute ĉirkaŭata de kelkaj junaj pioniroj. Post ili staris juna kadrino. Demandinte ŝin kiom longe ŝi partoprenis la revolucion kaj kiel ŝia laboro progresis, S-ino Felton demandis:

"Ĉu vi volas iri al Koreio por batali kontraŭ Usona agreso?"

Senhezite ŝi respondis:

"Ĉiu ĉino, kie ajn li estas, ĉiam estas preta batali kontraŭ Usona imperiista agreso!"

Kun Pekina Familio

Tagmezo alproksimiĝis. Ni akompanis ŝin iri lunci kun Pekinaj amikoj loĝantaj en la nordorienta parto de la urbo, Gesinjoroj Huang. Poste S-ino Felton diris ke tio estis unu el la plej neforgeseblaj spertoj depost ŝia alveno en Pekino, ĉar tio alkondukis ŝin pli proksimen al ĉina popolo.



S-ino Felton kaj ŝia gastiganto

S-ro Huang estas nun 58-jara. Li estas la ĉefdirektoro de Junulara Kristana Asocio en Pekino kaj de privata mez-lernejo. Li estas plena de ĝojo, entuziasmo kaj vivforto. S-ino Huang estas strata reprezentanto por la kvindek familioj loĝantaj en tiu ĉi strateto. La geedzoj havas kvar filojn kaj kvar filinojn. Nur tri el ili nun restas en hejmo kaj la aliaj instruas en lernejoj aŭ laboras kiel inĝenieroj en la Sudokcidento. Kun ili estas ankaŭ Jen-ĉiu, ilia nepo.

La loĝejo de la Huang-familio estas tipa Pekina loĝdomo. Ĝi havas kvadratan korton kaj sur ĉiu flanko estas ĉambroj, malgrandaj sed bone aranĝitaj. Post kiam oni eniras la duan pordegon ruĝe lakitan oni trovas salonon frontantan suden. Ekstere susuris brue la folioj de kelkaj bambuoj. Kontraŭ la salono estas lun-pordego (t.e. ronda pordego) en muro kronita de densfolia hedero. De la salono oni povas vidi paron da ŝton-leonoj antaŭ la ŝtuparo ekster la manĝ-ĉambro kiu frontas norden. La korto estas dekoraciita per floroj plantitaj de S-ro Huang mem. Plej allogaj estas du granatarboj kiuj floras brile ruĝaj kaj unu "fea bastono," longa kaktos meze de kelkaj blankaj oleandroj.

La interna dekoracio estas ankaŭ en tipe Pekina stilo. Sur la longa tablo estas kelkaj marmor-kaj jad-ornamaĵoj kaj arĝent-trofeoj gajnitaj de la infanoj. Unu rul-pentraĵo de floroj fare de la fama pentristo Ĉi pej-ŝi pendas sur la muro.

"Ni sentas grandan honoron," diris S-ro Huang, "pro tio ke S-ino Felton, tiel okupata pri pac-laboro, povas disponi tempon por veni hodiaŭ al nia humila domo. Mi legis el la ĵurnaloj ke lastjare vi parolis la veron pri Koreio en Eŭropo kaj pro tio vi estis persekutata de tiuj kiuj malamas pacon. Ni kredas ke ĉiuj britaj popolanoj estas same kuraĝaj kaj veremaj kiel vi. Tial hodiaŭ kiam mi premas vian manon, mi sentas kvazaŭ mi premus la manojn de la tuta brita popolo!"

S-ino Felton estis kortuŝita pro tiu ĉi simpla sed sincera parolado. La interspaco inter la gastigantoj kaj la gasto tuj malaperis.

Poste la konversacio iom post iom direktiĝis al situacio en Britlando.

Dum la babilado pri Britlando daŭris interne de la ĉambro, malgranda Jen-ĉiu en lignaj sandaloj postkuris lanugan kateton en la korto meze de la floroj. La tria filino paŝis al S-ino Huang kaj flustris ion ĉe ŝia orelo. Ŝi leviĝis kaj diris ridetante al la gastoj:

“Lunĉo estas preta.” Poste ŝi petis senkulpigon. “Ĉiuj pladoj estas preparitaj de mi mem. Estas neeble kompari ilin al la arto de la kuiristoj en via hotelo.”

Trapasante la korton S-ino Felton esprimis sian admiron pri la floroj. Malgranda petolema Jen-ĉiu sidis sur ŝton-benke sub la vitoj. La kateto estis nun obeema kaptito sur liaj genuoj.

Laŭ Pekina kutimo la honora gasto sidis vizaĝe al la bambu-ŝirmata pordo. Sur la tablo estis jam metitaj kvar pladoj da malvarmaj viandoj kaj antaŭ ĉiu homo, glaso da rizvino.

“Al la Brita Popolo!”

S-ino Huang levis sian glason, riverencis kaj diris:

“Ni trinku pro la sano de S-ino Felton! Pro la sano de la brita popolo! Ni esperu ke ili baldaŭ sukcesos atingi lumon tra la malluma labirinto kaj marŝos antaŭen al prospero, al feliĉo kaj paco!” Pro tiu tostoj ni ĉiuj trinkis kun granda varmo.

Stufita fiŝo kun saŭco, fritita bovaĵo, viand-peco, fritita koko kun pipro..... unu plado post alia lerte preparita de S-ino Huang estis alportata. Estis nature ke la babilado sin turnis al manĝoj en Britlando.

Estis malfacile por la gejunuloj kompreni la porcistemon en Britlando kiun S-ino Felton klarigis.

Du ovoĵoj po tago..... unco da fromaĝo.....du pecetoj da ŝinko en tia lando kia Britio, tio estas apenaŭ komprenebla.

Tiam ŝi rememoris sian babiladon kun du ĉinaj laboristinoj la antaŭan tagon kaj sian surprizon post kiam ŝi komparis var-prezojn por vidi kiom la ĉina laboristo povas aĉeti per sia salajro.

“Via prezo por tomato estas nur sesono de tiu en Londono. Viaj laboristoj povas aĉeti por si multe da legomoj kaj fruktoj. Niaj britaj laboristoj ne estas tiel feliĉaj!”

Poste ŝi demandis S-ino Huang pri la prezo de ovoĵoj. S-ino Huang respondis ke ovo-prezoj iomete varias laŭ sezonoj. La plej bona sezono por ovo-produktado estis jam for. Antaŭhieraŭ ŝi preparis salitajn ovoĵojn kaj ŝi aĉetis 200 ovoĵojn. Ŝi pagis 27,000 juanojn por 100.

S-ino Felton faris kalkuladon. Supozu ke oni pagus kvar pencojn por unu ovo, tiam la sama monsumo sufiĉas nur por 27 ovoĵoj en Britlando. Sed la komparado signifas nenion. Fakte estas ke ĉiu homo povas aĉeti nur tri ĝis kvar ovoĵojn ĉiusemajne se li estas feliĉa. Ofte li ricevas nur unu aŭ du kiel sian porcion.

Post la lunĉo la gastigantoj kaj gastoj reiris al la salono por frukt-manĝado. Sur plado alte amasiĝis dolĉaj persikoj grandaj kiel pugnoj kaj purpuraj prunoj.

S-ino Huang legis en la ĵurnaloj ke la Dekano de Canterbury estis persekutita en Britlando. Estante kristano li multe prizorgis pri tio: “Tiuĵ malamikoĵ de Paco deklaris ke la Dekano jam splitis Britlandon en du.” S-ino Felton respondis kun la tradicia decidemo

kaj sentimeco de la brita popolo kontraŭ tiraneco. “La Dekano gajnis sian plej grandan venkon se li splitus la pacaman britan popolon for de tiuj kiuj stulte obeas la Usonajn militinstigantojn.”

En tiu ĉi momento iu menciis la antaŭnelonge publikigitan deklaron de Vic-ministro por Fremdlandaj Aferoj, Ĉang Hanfu pri la komerco inter Ĉinio kaj Britlando. Ŝi diris:

“Mi absolute kredas la sincerecon de la ĉina popolo kiu volas komerci kun ni. Mi ankaŭ povas diri ke la brita popolo—kaj ankaŭ la brita registaro deziras komerci kun Ĉinio. Niaj delegitoj al la Internacia Ekonomia Konferenco sciigis al mi en Moskvo ke, se Britlando estus permesata komerci kun nova Ĉinio, nia plena forigo de senlaboreco kaj prospero dum la venontaj dudek jaroj povus esti garantiataj. La problemo nur dependas de tio, ĉu la Churchill registaro kuraĝas defii la usonanojn.”

“Nenio estas pli klara ol tio kial Britlando devas komerci kun Ĉinio,” ŝi daŭrigis. “La problemo de senlaboreco en mia lando jam fariĝas pli kaj pli serioza. Komence tio nur influis la teksan industrion en Lancashire. Nun ĝi disvastiĝas al ĉiuj industrioj. La plej lasttempa, nekompleta cifero kiun mi vidis estas 800,000 homoj diversgrade maldungitaj.

Tio kio plej indignigis S-inon Felton estis la fakto ke dum Usono ne permesas Britlandon komerci kun Ĉinio, ĝi mem starigas impost-barilojn kontraŭ Britlando.

Jam pasis la tria. La plejparto de la Pekinaj loĝantoj estis ĝuantaj someran postmanĝan dormeton. Sed S-ino Felton ankoraŭ ne emis foriri.

“Mi diru al vi alian kazon por montri kiel la brita popolo ekmalŝatis la Usonajn militinstigantojn,” ŝi diris dum ŝi aranĝis sian valizeton pretigante sin por diri adiaŭon. “Unu tagon mia amiko atendis aŭtobuson. Iom poste du Usonaj aerarmeanoj ankaŭ venis kaj ĝin atendis: Kiam la aŭtobuso fine alveturis, la kontrolistino deklaris ke la veturilo estas jam plena kaj ke nur unu homo povas esti akceptata. Mia amiko supreniris.

“Tio furiozigis la Usonajn aerarmeanojn. Ili protestis kaj diris, ‘Ĉu vi ne scias ke estas ni kiuj gajnis por vi la venkon?’

“La kontrolistino rigardis ilin malrespekte kaj poste diris, ‘Bedaŭrinde, mi ne sciis, ke vi estas rusoj!’

“Ĉe tio ŝi fermis la pordon kaj forkuris la aŭtobuso.”

En tiu momento la kvara filino de la geedzoj subite kuris al la salono el ekster la lun-pordo. Ŝi alportis aron da floroj freŝe deprenitaj el la korto—diverskolora gladiolo kaj dalio—por la gasto el Britlando. S-ro Huang metis antaŭ ŝin atlaskovritan albumon. Sur la kovrilo estis la surskribo: “Memore al Honoraj Gastoj.” S-ino Felton skribis en ĝin:

“Mi neniam forgesos la ĝojan sperton de mia unua vizito al ĉina domo kaj la inspiron de la mirinda atmosfero kaj amikeca konversacio. Mi sopireme atendos nian venontan renkontiĝon. Monica Felton.”

En klara ĉina lingvo ŝi diris, “Ŝieh ŝieh” signifanta “dankon”.

Adiaŭante ŝin ĉe la pordego S-ro Huang reprezentante ĉiujn parolis kun profunda emocio:

“Bonan vojaĝon! Estu ĉiam pli forta fizike kaj spirite! Kaj daŭran sukceson por via misio de paco!”

Trad. I. K.

Armea Sportkunveno Brile Malfermiĝis en Pekino

Je la 1-a de aŭgusto la 25a datreveno de la Popola Liberiga Armeo, 7,000 atletoj kaj dancantoj venintaj el ĉiuj sekcioj de la armeo, faris amasan prezentadon de fizika kulturo, gimnastiko kaj danco en Pekina Popola Stadiumo.

Dum la kolorplena oficiala inaŭguro de naŭ tagoj da sportoj, dramaj, dancoj kaj kantoj, 30,000 popolanoj aŭdis de Ĉef-komandanto Ĉu Teh la instigan paroladon al ĉinaj armeanoj, ke ili progresu ambaŭ fizike kaj kulture tiel same kiel ili kontribuis al land-konstruado kaj defendo.

Vic-ĉefministro Kuo Mo-jo lin sekvis dirante, ke hodiaŭa atleta kunveno de Popola Liberiga Armeo ne estas por amuzo momenta. Ĝi montras la disvolviĝon de fizika kulturo de la tuta armeo kaj donas ekzemplon por la tutlanda populara fizika kulturo.

La atletoj kaj membroj de la drama, danca kaj kanta grupoj marŝis post la impone brilanta procesio de 100 ruĝflagoj. Iliaj saneco, ĝojeco kaj juneco kaŭzis altan entuziasmon de la rigardantaro. Kiam ĉiu brile vestita teamo staris ĉe sia loko kontraŭ la estrado, la kolorplena sceno fariĝis tre ĝojiga. La blanko kaj bluo de la aviadist-ludantoj kaj la malhela verdo, ruĝo kaj bruno de la armeanoj faris mirindan kontraston kun la brilaj, naĝ-kostumoj de la marist-naĝantoj kaj la skarlatato de la ĉeval-rajdantoj el Interna Mongolio.

Plue estis la multkoloraj vestaĵoj de la dancistoj el Sinkiang kaj aliaj naci-minoritataj areoj.

Kiam sin montris la reprezentantoj de Ĉinaj Popolaj Volontuloj en Koreio, tondris varmaj aplaŭdoj.

Amasaj fizikaj ekzercoj de armeanoj kaj studentoj ambaŭ estis elstaraj de tiutaga elmonro. 1,500 brunaj junaj atletoj montris sian bravecon en kolektiva prezentado gracia kaj preciza, kaj poste grupo da studentinoj ekzercis kun muziko simile al amasa dancado.

La enhavoj de la dramo kaj danco, luditaj de armeanoj estis kunligitaj ĝuste kun la okazintaĵoj de iliaj vivo kaj edukado. La "ŝipista danco" akiris grandan favoron de rigardanto. La viglaj maristoj lerte dancis kun humoro kaj facileco desegnante sian ĉiutagan vivon sur la ŝipo.

Akrobataĵoj, inkluzive de mirindaj prezentaĵoj kiel ludoj sur sol-stango, biciklado kaj ŝnur-grimpo, estis sekvataj de dancoj esprimantaj la unuecon de ĉiuj nacioj de Ĉinio.

Inter la rigardantoj estis la estroj de Centra Popola Registaro kaj membroj de Diplomatia Korpuso, la Pola Korbopilka Teamo kaj Ĉeĥoslovaka Vit-Nejedly Armea Kanta kaj Danca Grupo.

Popolamasoj sin vicigis sur la strato kondukanta al la stadiumo kaj hurais al la atletoj, kiuj venis de ĉiuj anguloj de la lando. Tiu ĉi unuafoja nacia sporta kaj kultura kunveno de armea forto en Pekino estis tago eksterordinare signifplena por la junuloj. Tio markis novan ŝtupon en disvolviĝo de fizika kulturo de Ĉinio.

Trad. Nash

La P.L.A. Igas....

(daŭrigo de p. 206)

fariĝi memsufiĉa en fruktoj, vegetaĵoj kaj tabako. La akroareo por kotono estos ekspansiita por provizi la bezonojn de la kreskanta teksindustrio de Sinkiang. Dek kolĥozoj estos establita kiel modeloj por la kamparanoj, ĉiu kun 700—1,000 hektaroj da tero. La konferenco samtempe fiksas kiel elementan celadon, la kulturon de 200,000 hektaroj en 1953. En la kuranta jaro, terlaboraĵo de 30 milion kubmetroj entute kaj 1 milion kubmetroj da ŝtonlaboraĵo estos kompletigitaj sur la riveroj Manas kaj Ili. Tiamaniere, en 1953, al aliaj 100,000 hektaroj da tero proviziĝos irigacio en tiu ĉi areo.

Pli multaj P.L.A.-anoj trejniĝos kiel agrikulturaj teknikistoj, ŝoforoj kaj brut-bredistoj en diversaj trejnkursoj.

La kvar mekanikigitaj farmoj postulataj en tiu ĉi plano estas jam establita, kaj ĉiuj necesaj konstruaĵoj jam kompletigis sur vasta terspaco en la valoj inter la riveroj Manas, Kaitu kaj Toŭtun kaj en la stepo de Ĉienteh-gubernio, traktoroj Stalin-80, kombajnoj kaj aliaj modernaj terkulturaĵoj estas en uzo ĉi tie. Unu el tiuj ĉi farmoj la Aŭgusto-Unua Farmo, kiu estas nomata en memoro de la fondiĝdato de la P.L.A. kaj kiu lokiĝas sur la bordo de la Toŭtun-rivero, komencis vintro-semadon lastvintre. Ĉijare, ĝi uzos

selektitajn semojn de diversspecaj grenoj de Kansu-provinco kaj de la Soveta Ukrainio. Tiuj ĉi kvar farmoj estas montrantaj la manieron por la organizo de scienca mekanikigita laboro por kolĥozoj kiuj sendube estos establita de la plej progresaj kamparanoj de Sinkiang post la kompletiĝo de agrara reformo. La P.L.A. jam sin okupis provizi tiajn farmojn per helpoj en la formo de instrumentoj, maŝinoj kaj konstruaĵoj. Unu el la dek kolĥozoj menciitaj en la plano estis starigita apud Ĉienteh de kamparanoj de diversaj nacioj.

Krom tiuj ĉi agrikulturaj taskoj, la P.L.A. daŭrigas siajn urbon kaj industriajn konstruojn. Pli ol 300,000 kvadrataj metroj da fabrika plankspaco estos konstruitaj ĉijare, kaj 5,000 P.L.A. sapeistoj estos trejnitaj kiel spertaj konstrulaborantoj.

Sinkiang, kun sia areo de sesono de la tuta Ĉinio, kun siaj abundaj mineralaj kaj arbaraj riĉaĵoj, havas nemezureblajn eblecojn de prosperiĝo por sia kreskanta loĝantaro de ĉirkaŭ kvin milion popolanoj. La krima ekspluatado fare de la malnovaj reakciaj reĝimoj kaj ilia malŝparo de akvo kaj aliaj riĉaĵoj jam longe tenis ĝian popolon en malriĉeco. Gvidate de la Ĉina Komunista Partio, la heroo P.L.A. jam la teritorion liberigis. Nun, por liberigi ĝian kaŝitan riĉaĵon por servi al la popolo, ĝiaj energiaj paŝoj en rekulturo de tero, irigacio, industria kaj aliaj produktaj taskoj estas ludantaj ĉefan rolon.

(Trad. Fukango)



“Milita Celajo”

Korea patrino kaj ŝia infano vundita de Usona bombardado en la Panmunjom-a neŭtrala zono, je la 5a de junio. Tiu ĉi bildo dolorige montras al ni la kruelan realon de la Usona bombardado al la sendefendaj civiluloj kaj nemilitaj celajoj en Koreio per eksplodaĵo aŭ napalmo.

“Napalmo,” skribis korespondanto el Koreio pri la kruelaĵo de napalma atako, “estas gelatenigita petrolo kiu . . . algluas al la haŭto kaj verfakte kuiras la karnon kaj histon. Multaj homoj mortis terure de la bruloj kaj terurfrapo kaj ankoraŭ pli multaj postvivas kiel irantaj monstraĵoj naŭzataj de siaj propraj figuroj.” Kaj al tiuj ĉi fiagoj, la Usonaj agresantoj aldonis demonan bakterian militadon.


Tia estas la milito nun kondukata de la Usonaj memtitolitaj “defendantoj de civilizo”.



Spo

en honoro de la
fondiĝo de la P
en Pekino, de la


Ĉefkomandanto Ĉu Teh
responde salutas la pre-
termarsantajn sportulojn.
Vicĉefstabano Su Ju staras
ĉe lia dekstro.



Sportuloj kaj membroj de la dramaj, dancaj kaj kantaj trupoj, de P

Preskaŭ same rapidaj rajdistinoj el Interna Mongolio

Ĝoja surteriĝo. Du paraŝutistinoj



Profesto

25a datreveno de la Popola Liberiga Armeo, la ĝis 11-a de aŭgusto.


Kultura trupo de P.L.A. en malferma parado sur la Popola Stadiumo



A. en la areno de la Popola Stadiumo ĉe la Templo de Agrikulturo.


respondas la aklamon de rigardantoj.

Homaj radoj. Sceno de la gimnastika prezentado




Li Jun, elstara labormodelo, estas gvidanto de la teamo respondanta pri la lokomotivo nomita laŭ Prezidanto Maŭ Zetung, kiu kuris en kvar jaroj 200,000 kilometrojn sen paneo.

La nova flulinia ekspreso inter Pekino kaj Tienzino



PRI NOVĈINIAJ FERVOJOJ

Multaj novaj rekordoj estas kreitaj en pliigo de efikeco, en prizorgo de pasaĝeroj kaj la laborantaro—ĉiuj estas facetoj de la Nova Demokratio en agado en grava ekonomia sfero.



observa vagono de la Pekin-Tienzin-a ekspreso

Novaj hejmoj por fervojistoj en Kantono

La P.L.A. Igas la Dezerton Floranta

C. Y. Ying

En Sinkiang-provinco, kiun malnovstilaj esploristoj ŝatis nomi la "morta koro de Azio," kie la riveroj sin perdis en sablon kaj antikvaj urboj malaperis sen postsigno, la Popola Liberiga Armeo de Ĉinio estas pioniranta grandan projekton kiu estas helpanta revivigi tiun vastan regionon, tio estas, faranta la dezertojn flori kaj altiganta la vivnivelon de la popolamasoj al alteco super la hieraŭaj sonĝoj.

Tio ĉi estas unu el la plej mirindaj faroj de la hodiaŭa P.L.A.—armeo de produktado, krom defendanto de la popoldemokratio kaj paco.

Sinkiang, la plej granda provinco de Ĉinio, havas abundajn naturajn riĉaĵojn. Sed nur nun sub la Nova Demokratio estas eble meti tiujn ĉi riĉaĵojn al utilo por la popolo kaj solvi la malfacilajn problemojn de irigacio kiu sole povas revivigi la senfruktajn dezertajn areojn. La P.L.A. alvenis al Sinkiang en la aŭtuno de 1949. Militaj operacioj por likvidi la restantajn bandit-trupojn de la Kuomintango estis baldaŭ kompletigitaj. Tiam la P.L.A. sin turnis al konstruado surbaze de la instrukcio de dec. 5, 1949 de Maŭ Ze-tung kiel prezidanto de la Popola Revolucia Milita konsilo, en kiu estis substrekata ke la P.L.A. estas "ne nur armeo por nacidefendo, sed ankaŭ armeo de produktado por helpi la popolon tra la tuta lando konkeri la malfacilaĵojn postlasitajn de longa milito kaj por akceli la konstruon de nov-demokratia ekonomio."

La P.L.A. en Sinkiang jam tiel bone plenumis tiun ĉi instrukcion ke en 1951, ĝiaj unuoj produktis entute riĉaĵon egalvalorantan je 1,000,000 milion juanoj—sumo sufiĉa por komplete ekipi modernan kotonŝpincejon kun 300,000 spindeloj. Ili tion ĉi atingis fakte per malpli da hompovo ol en 1950. Konsiderindaj nombroj da homoj jam estis ensorbitaj en la nove establitaĵojn fabrikojn kaj aliajn entreprenojn de Sinkiang. La semita areo estis ankaŭ iome malpli granda—65,400 hektaroj aŭ fakte 2% malpli ol en 1950. Malgraŭe la lastjara produkt-kvanto de greno estis 27 procentojn pli alta ol en 1950. Pli altaj po-hektaraj produktoj estis akiritaj. La maizrikolto, ekzemple, atingis la rekordon de 9.53 tunoj po hektaro dum rizorikolto, 9.81 tunoj po hektaro. Kaj krome, ili bredis 400,000 brutojn, plimultiĝo de 138% super 1950.


Revoluciigi Terkultur-metodojn

Komencante konstrulaboron en 1950, la Produktokomitato de la P.L.A.-a komando de Sinkiang-militregiono faris la tutecan planon kaj establis lokajn produktokomitatojn por la planon plenumi paŝon post paŝo. Ĉiu arma unuo entreprenis difinitan parton de la plano. Reprezentantoj kaj labormodeloj kunvenis de tempo al tempo por interŝanĝi spertojn kaj ideojn.

La P.L.A. jam revoluciigis terkulturajn metodojn en Sinkiang. Anstataŭ kreskigi diversajn rikoltaĵojn en malgrandaj strioj da tero, kiel estis kutime tie, ili kreskigis nur unu specon de rikoltaĵoj sur vastaj terpecoj kiuj estas plugitaj kolektive kaj ili alterne ŝanĝis la rikoltaĵojn ĉiusezone por reakiri la fekundecan de la tero. Tio ĉi amplekse simpligis la taskojn de irigacio kaj divido de laboro. Plie, tio ĉi ebligas la P.L.A.-n uzi progresintajn sciencajn teknikojn kaj mekanikigitajn instrumentojn, precipe post kiam la unuajaraj rikoltoj donis al ili superenspezon per kiu ili povis aĉeti pli multe da modernaj terkulturaj maŝinoj el Sovetunio. Ili ankaŭ sukcese eksperimentis per novaj instrumentoj de ili mem faritaj. Unu regimento sole faris 25 specojn da tiaj novaj aŭ plibonigitaj agrikulturaj instrumentoj en 1951. En Tihua kaj kelkaj aliaj regionoj ili jam establis eksperimentajn farmojn sur kiuj ili elprovis novajn mekanikigitajn terkulturmetodojn.

Tiuj ĉi agrikulturaj sukcesoj ne povus esti atingitaj sen laboroj de akvokonservado kaj irigacio. Pluvfalo en Sinkiang estas malabunda. Tial akvorezervejoj devis esti konstruitaj por konservi la akvon de la internlandaj riveroj kiuj dreniĝas senutile en la sablon. Kompleksa sistemo de fosoj kaj kanaloj estas ankaŭ bezonataj por konduki la akvon al la tero apud aŭ for de la riveroj, kiu estas riĉa virga tero kaj kiu nur bezonas akvon por fariĝi fekunda kulturebla grundo.

En 1950, 2 milion metroj da irigaciaj kanaletoj estis fositaj kaj riparitaj; 27,000 metroj da digoĵoj kaj du akvorezervejoj estis riparitaj por irigacii 84,000 hektarojn da tero. En la posta parto de la jaro, la P.L.A. komencis la konstruadon de grandskala irigacio-reto destinita por ŝanĝi pli ol 330,000 hektarojn da nun "morta" grundo en fekundajn kampojn en la daŭro de kvin jaroj.



PLA-anoj kulturigas virgan teron en Sinkiang

Aldone al tiu ĉi vasta projekto, la P.L.A. en 1951 fosis pli ol 190 akcesorajn irigaciajn kanaletojn; konstruis 2,700 metrojn da digo; 4,000 metrojn da akvobariroj; kompletigis tri novajn rezervejojn kaj 85 kluzpordojn. arkdrenilojn, kanaletojn kaj pontojn. Tiuj ĉi farajoj provizis irigacion por aliaj 30,700 hektaroj da tero.

Tamen tio ĉi ne estas ĉio. Transformi la dezerton en verdan landon jam delonge estis sonĝo de la Nordokcidenta popolo. Tiu ĉi sonĝo estas nun rapide realiĝanta dank' al la irigacia laboro de la P.L.A. kaj ĝiaj grandaj paralelaj atingoj en forstigado. 1,200,000 arbidoj, aŭ kvinoble tiom da arbidoj plantitaj en 1950, estis plantitaj en 1951, kaj la rapideco estas ankoraŭ pliiganta. Ĉiu regimento nun havas sian propran arbidvartejon preparantan por grandskala forstigado.

Bazo por Industriigo de Sinkiang

Tiaj grandaj akvokonservaj projektoj postulas la uzon de diversaj materialprovizoj kaj instrumentoj. La disvolvo de agrikultura produkto, fare de la P.L.A. en Sinkiang, tiel estigis la disvolviĝon de multaj branĉoj de industrio. La kresko de novaj industrioj, tamen, bezonas kapitalinvestojn. De kie do la P.L.A. havigis al si la necesan kapitalon por tiuj ĉi cementfabrikoj, brikbakejoj, ferfandejoj kaj feraĵlaborejoj, maŝin-fabrikoj por ripari kaj manufakturi agrikulturajn ilojn kaj maŝinojn, kaj procedaj laborejoj por la kamparaj produktaĵoj? Parte ili ricevis de asigno de ŝtatkapitalo kaj ŝparoj en armeaj elspezoj, kaj parte de vendado de siaj superfluaĵoj agrikulturaj produktaĵoj. La profitoj gajnitaj el tiuj ĉi entreprenoj estis poste re-investitaj en novajn industrientreprenojn ankoraŭ pli-grandskalajn.

Ekzemple la konstruon de granda kotonteksejo oni komencis en la somero de 1950. Ĉi-printempe, ĝi jam estas produktanta kotonteksaĵon. Ŝtal- kaj cement-fabrikoj, aŭtomobilaj riparejoj, hidroelektraj povocentrejoj kaj karbo-irigataj povocentrejoj funkcias ĉirkaŭ la aŭtuno de 1952. Liberĉiela karbominejo estis komencita en julio, 1951—tio ĉi provizos sufiĉan hejtajn

por ĉiuj fabrikoj funkciaj ĉi-jare. Dum 1951 sole, la P.L.A. en Sinkiang konstruis fabrikajn kaj loĝejajn domojn kun tuta plankspaco de 110,000 kvadrataj metroj.

Hodiaŭ, la P.L.A. havas sian propran grandan aron da specialistoj en multaj kampoj de inĝenierado kaj konstrua laboro.

Armeo Konstruas Urbon

En februaro ĉi-jare, cirkuliĝis la unuaj raportoj ke la P.L.A. en Sinkiang estas konstruanta tutan novan urbon sur la stepo, aldone al la multaj loĝejoj kaj vilaĝoj kiuj jam elkreskis en la nove irigaciitaj regionoj. La nova urbo kovros areon de 14 kvadrataj kilometroj, kaj estos kompletigita en 1956 kun la unuaj partoj pretaj por okupado ĉirkaŭ la fino de tiu ĉi jaro. La tuta projekto estis planita je giganta skalo. Ĝi revoluciigos la urban vivon en Sinkiang. Ĉiuj stratoj elradios kiel radradioj, el la urbcentro kie la administraj konstruaĵoj koncentriĝos. Ĉe la sudo apud la fervojstacio kuŝos la komerca areo. La okcidento estos la ĉefa industria areo. Arboj kaj floroj estos grandnombre plantitaj por ke ĝi fariĝu vere ĝardena urbo. Modernaj farmoj ĝin ĉirkaŭos. Centoj da loĝejoj estis jam kompletigitaj; multaj vojoj jam pavimitaj kaj kanaloj jam fositaj por plifaciligi la transportadon.

Laborante en brulvarmejo kaj en vetero je proksimume 40 gradoj sub la nulo, la P.L.A.-batalantoj kaj iliaj civilaj helpantoj montris eksterordinaran entuziasmon en siaj taskoj, esperante la rapidan progreson de la vivkondiĉo de la popolo de la tuta regiono. Unu el ĉiu kvin de la kadroj kaj batalantoj jam akiris la eminentecon de labormodelo en la urbkonstrua projekto. Raciigaj proponoj kvinobligis la rapidecon de brikmetado deŝt la laboro komenciĝis.

La Popolo Rikoltas Profitojn

La popolo de Sinkiang jam estas rikoltanta gravajn profitojn de la pionira produkt-laboro fare de la P.L.A. Ni jam menciis la nove irigaciitajn grundojn. Ili ja estas grundoj ne sole de novaj rikoltoj, sed ankaŭ de novaj labor- kaj viv-manieroj. La P.L.A. jam montris la avantaĝojn de kooperativa labororganizo kaj kolektiva, grandskala mekanikigita terkulturado. La popolamasoj baldaŭ vidis la lecionon, kaj estas organizantaj sin mem en labor-interŝanĝajn brigadojn kaj inter-helpajn grupojn—preparaj paŝoj al kolhozoj. En 1951, estis jam 91,000 inter-helpaj grupoj en Sinkiang kun 800,000 membroj, el kiuj 290,000 estis virinoj. Kiel rekta rezultato de pli bona irigacio kaj labormetodoj enkondukitaj de la P.L.A. kaj iliaj propraj kolektivaj klopodoj, la Ujvuraj kamparanoj de Ŝufu-gubernio, ekzemple, plimultigis sian grenprodukt-kvanton en 1951 je 8.4 procentoj super tio de 1950, kiu estas 19 procentojn super tio antaŭ liberigo. koncerne produkton pohektaran, la tuta provinco prezentas plialtiĝon de gren-produkt-kvanto je 10.4 procentoj kompare kun tio de 1950.

En la frua parto de 1952, la produktaj komitatoj de la P.L.A. en Sinkiang konferencis en Tihua por decidi pri siaj strategio kaj taktiko por konstruado en la kuranta jaro. Planoj estis ellaboritaj por kulturi 107,000 hektarojn da tero; prepari 20,000 hektarojn por mekanikigita terkulturado; establi kvar mekanikigitajn farmojn; produkti 110,000 tunojn da greno (35,000 tunoj en 1950);

(daŭrigo sur p. 200)



Ujvuroj alrajdis de malproksime por rigardi kiel la PLA-anoj terkulturas per maŝinoj.

Kaŭ Ju-paŭ, Soldato-verkisto Rakontas Sian Historion

Jang Ju

Lia nomo fariĝis fama en la daŭro de unu nokto. Milionoĵ da legantoj atendas hodiaŭ senpacience por legi lian aŭtobiografian novelon el 300,000 ideografoj. La ĉefa ĵurnalo de Ĉinio—la *Popola ĵurnalo* en Pekino kaj multaj aliaj ĵurnaloj kaj gazetoj skribis specialajn artikolojn por prezenti tiun ĉi novan verkiston, Kaŭ Ju-paŭ, kaj lian verkon. Sed kiam mi parolis pri li kiel “verkisto”, tiu ĉi dudekses-jara soldato en herb-verda uniformo ridetis malaprobante kun plej sincera modesteco.

“Kamarado, mi estas nur ordinara popola batalanto!”

La blanka signaĵo super lia maldekstra brustpoŝo briletis en la sunlumo. La inko-nigraj ideografoj legiĝis simple kaj fiere: La Popola Liberiga Armeo de Ĉinio.

* * *

En novembro, 1947, iu malgranda vilaĝo nomita Sun en Liaŭtung-provinco, Nordorienta Ĉinio, estis liberigita de la popola armeo. Kiam la unua taĉmento eniris la vilaĝon, juna Kaŭ Ju-paŭ, farmlaboristo, estis riparanta porkstalon. Li rigardadis kun miro la novalvenantojn, kvazaŭ li vidus sonĝon realiĝinta; tiam li eksaltis kaj kriis: “Vi finfine venis, la armeo de ni malriĉuloj!”

Filo de malriĉa kamparano, Kaŭ Ju-paŭ, pasigis sian infanaĝon kiel porkpaŝtisto, prizorgante la porkojn de la bienulo, dum liaj patrino kaj fratino elfosis sovaĝajn legomojn por nutri la familion. Kiam li estis okjara, iu bonkora instruisto de la malgranda vilaĝlernejo estis frapita de lia vigla komprenemo kaj proponis instrui lin senpage. Sed nur kelkajn tagojn post kiam li komencis siajn lecionojn, li estis devigata de la bienulo forlasi la lernejon. “Legado”, diris la bienulo, “forprenos la atenton de Kaŭ Ju-paŭ for de la porkoj.” La sekvintan jaron malriĉeco pelis tiun ĉi malriĉan kamparanan familion for de la tero por serĉi vivrimedon en la urbo Dajren. Tie juna Kaŭ Ju-paŭ provis sin vivteni kiel dungito, laboristo en fabriko, ĉarpentisto.... Sed la vivo fariĝis pli kaj pli netolerebla sub la regado de la japanaj invadintoj kaj iliaj marionetoj en la Nordoriento. Liaj avo, patrino, onklo kaj unu frato ĉiuj mortis en la urbo pro malriĉeco, malsano kaj malsato. Kelkajn jarojn poste nur Kaŭ Ju-paŭ kaj lia patro revenis al sia hejma vilaĝo, malplenmanaj, malĝojaj kaj malkuraĝigitaj.

Ankoraŭfoje Kaŭ Ju-paŭ devis laboregi por la bienulo.

En tiuj amaraj tagoj Kaŭ Ju-paŭ havis unu esperon, kiu estis kiel brileto de lumo en la mallumo. Li ofte aŭdis rakonton pri “armeo de la malriĉuloj” kontraŭbatalanta ie la tiranojn, kelkfoje norde kelkfoje oriente. Iun tagon, baldaŭ, li esperis, ĝi venos al Sun-vilaĝo.

“Kaj finfine ĝi venis... la popola armeo. La armeanoj estis junaj homoj kiel mi. Ili komprenis nin, kvazaŭ ili estus kreskintaj inter ni. Kiam ili venis, ili ne permesis al la bienuloj subpremi nin popolanojn kiel en la pasinteco. Ili efektivigis la agraran reformon. La bienuloj estis renversitaj. Tiuj, kiuj bezonis, ricevis teron kaj domojn. La kamparanoj stariĝis. Mi decidis iri kun la popola armeo, ĉar mi sciis, ke ĝi estas vere nia propra armeo.

“Kamarado, mi ne scias, kiel priskribi nian Popolan Liberigan Armeon. Ĝi estas granda lernejo, universitato por ĉiu soldato. En tiu tempo la Milito de Liberigo estis direktata kontraŭ Kuomintango. Mi partoprenis en kelkaj famaj bataloj—la Liaŭjang-batalo, la batalo por Kalgano. Eĉ dum la ofte okazantaj bataloj kaj konstanta movado ni neniam ĉesigis nian studadon. Foje nia regimento iris de la Nordoriento al Kuangsi. Tio estis vojaĝo de pli ol 4,000 kilometroj. Kiam ni marŝis, ĉiu portis sur la dorso lignan tabulon, sur kiu estis skribitaj la novaj ideografoj de tiu tago por esti lernataj de tiu marŝanta post li. Jen kiel mi komencis lerni legi.”

Kiam Kaŭ Ju-paŭ parolis pri la P.L.A., liaj okuloj brilis pro fiereco. Li aliĝis al la armeo en 1947, kaj la sekvintan jaron ĉe la batalfronto li estis akceptita en la Ĉinan Komunistan Partion. Laborema, lojala kaj kuraĝa, li gajnis la titolon de “Merita Servanto de la Popolo” je ok diversaj okazoj.

“Nia P. L. A. similas al granda familio. Ĉiu en ĝi rakontos al vi la samon. Se ies piedoj doloras dum la marŝo, ni ĉiuj kutimis proponi porti lian pafilon aŭ varmigi akvon por li dum ripozo. Se iu estis laca, ni sentis honorigataj porti lian ŝarĝon. Kiam ni estis enloĝigitaj ĉe popolanoj, ni ĉiam laboris kun ili en kampoj. Ni estis feliĉaj fari tion. Se mi povas ion fari por igi aliajn feliĉaj, mi ĉiam estas feliĉa fari tion.”

Baldaŭ Kaŭ Ju-paŭ trovis, ke li havis specialan talenton—histori-rakontado. Dum la longaj, lacigaj marŝoj liaj rakontoj vigligis la kamaradojn en la kolono. Kiam ajn li sidiĝis kaj komencis rakonton, homoj tuj amasiĝis kaj aŭskultis atente. En sia infanaĝo, li iam estis ravita de la agoj de antikvaj herooj. Kiam li estis en Dajren, iu historirakontisto loĝis apud lia domo. Ĉiuvespere la knabo staris ĉe la fenestro kaj aŭskultis la rakontojn ĝis noktmezo. Ĉar li nun lernis legi iom en la armeo, ĉiun pagtagon, kiam li povis ion aĉeti, Kaŭ Ju-paŭ aĉetis kelkajn ilustritajn rakontlibrojn. Tiamaniere li kolektis pli kaj pli da rakontoj, sed inter ĉiuj siaj rakontoj li trovis, ke tiu, kiu plej profunde kortuŝis liajn aŭskultantarojn, estis la historio de lia propra vivo. Kiam li parolis pri sia infaneco kaj rakontis la amarajn memoraĵojn de la krueleco kaj la profundan mizeron, en kiun la familioj de la malriĉuloj estis ĵetitaj, li vidis larmojn veni en la okulojn de siaj kamaradoj; harditaj batalantoj pugnigis siajn manojn kun indigno brulanta en iliaj koroj.

Estis ankoraŭ alia bona rakontanto en la unuo de Kaŭ Ju-paŭ—tio estis kamarado Ĉih Ĉih-juan, ĉefo de ĝia propagando kaj edukado-sekcio. Ĉih faris aranĝon kun Kaŭ Ju-paŭ. Ĉiufoje kiam Kaŭ Ju-paŭ rakontis historion, Ĉih, ankaŭ donis la sian. Dum Kaŭ Ju-paŭ rakontis al siaj kamaradoj pri antikvaj herooj, kamarado Ĉih priskribis la historion de la tempo, en kiu tiuj herooj vivis.

* * *

En aŭgusto, 1949, la unuo de Kaŭ Ju-paŭ postenis en Ĉangŝa, tuj post kiam la urbo estis liberigita. Je la deka matene, la 25an (tion Kaŭ Ju-paŭ memoras klare), dum li studis skribadon, li subite rimarkis

knabon ludantan ekstere kun nova bildlibro. Ĝi estis *La Juna Maŭ Ze-tung*. Kaŭ Ju-paŭ ĝin prunteprenis kaj tralegis. Li estis profunde kortuŝita. Precipe lin frapis la sekvantaj linioj: "Demando eniris en la cerbon de Maŭ Ze-tung—kial la herooj de ĉiuj rakontoj kiujn mi legis, estas aŭ altrangaj oficistoj kaj grandaj generaloj, aŭ talentaj junaj sinjoroj kaj belaj sinjorinoj? Kial ili neniam estas homoj kiel honestaj kamparanoj?" Kaŭ Ju-paŭ ekprenis tiun ĉi penson. "Kial do, vere?" Li malfermis sian librujon kaj trarigardis ĉiujn malnovajn novelojn. Kial la malriĉa, honesta homo tiel malofte aperas kiel heroo en libroj? Li demandis sin mem. Ankoraŭfoje li vidis la malĝojajn vizaĝojn de siaj avino, patrino, onklo, frato kaj aliaj el subpremitoj, kaj la malamitajn vizaĝojn de la japanoj, la Kuomintangaj banditoj kaj la bienuloj. Li decidis skribi tian libron pri la ordinara homoj. La 27an de aŭgusto li faris por si mem notlibron kaj komencis skribi.

Tiutempe Kaŭ Ju-paŭ povis skribi nur kelkcent ideografojn. Dum du tagoj li daŭrigis sian taskon, sepofojn el dek li ne povis skribi la vortojn kiujn li bezonis. Sed kiam ajn li intencis ĉesi kaj formeti sian plumon, li kutimis demandi sin mem, kial li ne havis la eblon iri al lernejo, kaj lia malamo kontraŭ la malnova socio devigis lin daŭrigi. Li diris al si mem, re- kaj re-foje la konsilon kiun Lenin donis al la junularo: "Studu, studu, kaj studu denove!"

Sciante ke li studis diligente, kamarado Ĉih lin kuraĝigis kaj helpis. Ŝang Ĉi, la sekcia sekretario estis speciale komisiita por lin helpi, kaj ili havis ĉiutage lecionojn. Por plirapidigi sian skribadon, Kaŭ Ju-paŭ elpensis novan metodon: li faris du notlibrojn; en unu el ili li skribis sian historion kun la helpo de Ŝang Ĉi; kiam lia instruisto ne estis kun li, li skribis en la pli malgrandan. Kiam venis al li iu ideo, kiun li ne povis surpaparigi per ideografo, li desegnis por ĝi simbolon. Ekzemple por la vorto 眼 (okulo) li desegnis okulon; por la vorto 忙 (okupata) li desegnis vizaĝon kun gutoj da ŝvito sur la frunto. Kiam la instruisto venis, ili en-skribis kune la mankantajn vortojn. Kaj krome li devis kontraŭbatali la kutimajn malfacilaĵojn de ĉiuj

aŭtoroj. Kelkfoje li ne povis rememori scenon, nomon. Li pensis pene, kun kapo doloranta paŝis tien kaj reen en la ĉambro kaj pasigis maldormajn noktojn. Sed persisteme li daŭrigis sian laboron, kaj la libro kreskis konstante.

Unu tagon en decembro 1950, kiam Kaŭ Ju-paŭ jam finis kelkajn ĉapitrojn, kamarado Ĉih demandis lin, kio estis tio, kio tiel lin okupas. Kaŭ montris al li la manuskripton. Ĝi komenciĝis per la "Incidento de la 18a de Septembro". Ĝi priskribis la suferojn de malriĉa kamparana familio de la tempo. Kaŭ skribis la reston. Ĝi finiĝos per la feliĉa vivo, kiun la heroo trovis en la P.L.A. "Mi volas, ke la tuta mondo sciu pri tio!" La novaĵo baldaŭ disvastiĝis. Liaj kamaradoj en la regimento kuraĝigis lin daŭrigi per plena rapideco. Kamarado Ĉih skribis sur lia notlibro: "Kamarado Kaŭ, mi esperas, ke vi daŭrigos skribi kaj krei novelon egalan al *Kiel la Ŝtalo Estas Hardata*."

Iomete pli ol unu jaron poste, en januaro, 1951, la unua malneto de la novelo de Kaŭ Ju-paŭ aperis sur la skribtablo de la redaktoro de la *Literaturo de P.L.A.* en Pekino. Ĝin akompanis letero: "Mi volas, ke miaj fratoj de la tuta lando legu ĝin kaj ne forgesu tiujn diablajn malamikojn, prenu iliajn pafilojn kaj liberigu nian tutan landon, ke en la estonteco mirinda nova Ĉinio povu esti konstruata."

Kaŭ Ju-paŭ estis tuj invitita al Pekino, kie li diskutis pri sia libro, ĉapitron post ĉapitro, kun spertaj verkistoj kaj kritikistoj. Li kontrolis ĉiun vorton, kaj nun li ĝin reskribas.

"Mi opinias, ke mi povos fini mian skribadon ĝis la komenco de la venonta jaro. Tiam mi reiros al mia regimento. Mi havis amaran vivon en miaj infanaĝo kaj juneco. Nur mia patrino montris al mi profundan amon, sed ŝi mortis antaŭ longe. Nun, en la P.L.A. mi trovas ion, kio anstataŭas patrinan amon—vera kamaradeco. Mi estas nur ordinara soldato, sed mi apartenas al neordinara armeo. Estas sennombraj rakontoj, kiuj povas esti skribataj pri tiu ĉi armeo. Se niaj batalantoj volas ilin legi, mi daŭre skribos ĝis mia lasta tago."

Trad. K. Maier

La Homoj sur Korsin-stepo

(daŭrigo de p. 212)

"Kamaradoj!" kriis Amogulang. "Antaŭ ni estas jam la fajrozono. Ni lernu batali lerte kontraŭ la fajro, tio estas, unue disigu la forton de la malamiko kaj poste ĝin ekstermu popece."

"Tamen la fajrego estas tre furioza, miaopinie, kaj oni ne povas tuj alproksimiĝi al la fajrozono, tiukaze estus domaĝe al ni," intermetis maljuna Beiĵe, ne ĝisatendinte la finon de la parolo de Amogulang. "Ni devas forbruligi unue strion da la herbejo iomdistance antaŭ la brulego. Kiam ĝi etendiĝis ĝis tiu loko, la tieaj herboj estos jam forbruligitaj. Tiel ni povos ĝin estingi senriske! Tio estas la sperto de multjara brulestinga laboro." Li proponis kun fiero.

"La maljuna Beiĵe parolis prave, tio estas la plej bona rimedo—ni tiel laboru do!" diris Amogulang.

"Jes. Oni devas tiel trakti la stepan brulegon!"

Longedaŭra tumulto inter la amaso.

"Nu, ne plu tumultu! Ni agu laŭ la propono de maljuna Beiĵe. Antaŭ ĉio ni forbruligu pecon da herbejo laŭplane antaŭ la brulego. Kiam ĝi atingos la forbruligitan zonan, ni ekstermu ĝin dividantaj nin en kontraŭfajrajn grupetojn. Feliĉe hodiaŭ vespere pluvegos ankoraŭ, tiu tempo estos je nia granda avantaĝo. Tial la homoj de Korsin-stepo estas plejmulte benitaj. Laboru, kamaradoj! Kiam ni estingos la brulegon triumfe, niaj belaj junulinoj kantos por ni la Lungmejkanton. Tiel do!"

La fajrobrigado el pli ol tri cent homoj similis armeon kiu sieĝis urbon, kaj ĉiu batalanto, ĉu maljunulo ĉu junulo, ĉu virino, plena de fido pri la certa venko, ĵetis sin sur la fajromaron.

(daŭrigota)

Elĉinigi S. J.

*'Ligo' estas administra unuo en Interna Mongolio, responda al administra subregiono en aliaj ĉinaj provincoj, kaj 'standardo' estas administra unuo sub 'ligo', responda al gubernio. 'Otok' signifas en mongola lingvo 'vilaĝo'.

Subvencioj por Studentoj

Ekde tiu ĉi septembro, deklaris instrukcio publikigita antaŭ nelonge de la Administra Konsilo de la Centra Popola Registaro, studentoj tra Ĉinio en altaj lernejoj, duagrada lernejoj por trejni instruistojn kaj teknikistojn kaj lernejoj por kadroj de laborista aŭ kamparana deveno ricevos subvencion de la registaro por pagi ĉiujn iliajn manĝkostojn. La nombro de mezlernejaj lernantoj ricevantaj subvencion ankaŭ estos pliigita. Specialan konsideron estos donata al studentoj el transmaraj ĉinaj familioj. La instrukcio ankaŭ kondiĉas, ke studentoj kiuj ne povas aĉeti librojn kaj aliajn necesajn povas peti por stipendioj aldone al iliaj subvencioj.

Floras Hejma Komercio

Ĉina enlanda komercio ege disfloras. Komerciaj konferencoj okazantaj en ĉinaj ĉefaj komerciaj centroj traktas negocojn valorantajn je miliardoj da juanoj.

La komerca konferenco de la Centra-suda Ĉinio, kiu komenciĝis je la 10a de julio en Hankoŭ, komencis negocon je la 14a de julio kaj fermiĝis je la 31a de julio, estis ĉeestita de pli ol 4,000 personoj reprezentantaj ŝtatajn, kooperativajn komerc-unuojn el ĉiuj partoj de la lando. La 17-taga komercado rezultigis en negoco valoranta 2,323,000 milionoj da juanoj, t.e. trioblo de la tuta negocvaloro atingita dum la 75-taga komerca ekspozicio en la pasinta jaro.

La komerca konferenco de Sudokcidenta Ĉinio malfermiĝis je la 21a de julio en Ĉungking, fino ĉe Jangze-rivero de la nova Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo kiu malfermis vastan perspektivon por komercado kun la postregiono de Seĉuan-provinco, regiono riĉa je tabako, sukerkano, kolzsemo, tung-oleo, porkharegoj, silko, kanabo kaj vinoj. Pli ol 566,000 milion juanoj da negoco estis farita, t.e. 8 obloj de la tuta negoco farita ĉe la ekspozicio de lokaj produktaĵoj en lasta jaro.

Urbo - kamparaj komerciaj konferencoj en Orienta Ĉinio malfermiĝos en Ŝanhajo, Vusi, Hofej, Zinan, Nankino kaj en la tuta Ĉekiang-provinco. Estis grandaj postuloj por teksaĵoj, emajlaĵoj, sapo, medicinaj ekipaĵoj kaj kaŭĉukaj produktaĵoj. Grandaj mendoj por sportaj ekipaĵoj

kaj ludiloj estas faritaj de reprezentantoj el Nordorienta Ĉinio.

Kiel en aliaj partoj de la lando, Norda Ĉinio estas spertanta viglan interŝanĝon de industria kaj agrikultura produktaĵoj. En Ĉahar-provinco, templo-foiroj provizis al la kamparanoj tolon valorantan je pli ol 2,000 milion juanoj. Ĉe Ŝekiaĉuang, grava fervoja kuniĝejo kaj negoccentro en Hopej-provinco, la kamparanoj rapidis por aĉeti varmokonservajn botelojn kaj kaŭĉukajn botojn, ĝis nun rigardatajn kiel luksaĵojn.

Reguloj de Tunkvanto-Imposto

Por faciligi importan kaj eksportan komercon, instrukcio publikigita je la 18a de julio de la Dogana Administracio anoncis la enkondukon de kondiĉo por kolekti tunkvanto-imposton de ŝipoj unu fojon por ĉiu vojaĝo aŭ periode, kiel en la pasinteco, laŭ la bontrovo de la impostpaganto. Fremdlanda ŝipo vizitanta unu aŭ pli ol unu havenojn de Ĉinio kaj poste forveturanta alilanden estos rigardata kiel faranta unu vojaĝon. Tunkvanta imposto por ĉiu vojaĝo estos kolektita je duono de la procento postulata sub la metodo de perioda pagado. La atestilo pri pago de tunkvanta imposto validas por 30 tagoj post la enirpermeso al ŝipo, ĉu ĝi daŭrigos sian vojaĝon al aliaj havenoj en Ĉinio aŭ ne.

Industriaj Rekordoj

La produkto de maŝinoj kaj ŝtalo de Ĉinio superis la normon en la



dua kvarono de tiu ĉi jaro. Statistiko publikigita de la Ministerio de Peza Industrio montris ke en 17 el 23 ĉefaj artikloj en maŝinfabrado, fero kaj ŝtalo kaj aliaj produktaĵoj de peza industrio, la laboristoj jam

Verkoj de Prezidanto Maŭ

La dua volumo de la elektitaj verkoj de Prezidanto Maŭ Ze-tung fariĝis lasttempe havebla por la publiko en Rangoon. La libretoj vendantaj tiun libron estis plenplenaj de avidaj ĉinaj legantoj, dum multaj birmanoj kaj hindaj minoritatoj kolektiĝis ekster la montrofenestroj por rigardi la portreton de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj lian libron.

La unua kaj dua volumoj de la elektitaj verkoj de Prezidanto Maŭ jam aperis en la japana lingvo en kvar volumoj. Ili estas vaste diskutataj en studrondoj en fabrikoj, kolegioj kaj inter la ĝenerala publiko.

La franclingva traduko de ia verko de Prezidanto Maŭ "Pri Kontraŭdiro" aperis en la aŭgusta numero de "Cahiers du Communisme."

superis la antaŭfiksitan celajon. Produkto de internebrulaj maŝinoj atingis 147.5% de la fiksita normo; ŝtal-ingotoj 114% kaj ŝtalplatoj, 110%.

* * *

Ŝanhajo jam produktis la unuan 240-kilovatan vapor-generatoron kies partoj ĉiuj estas faritaj en Ĉinio. Tio ĉi estas komuna produktaĵo de teknikistoj kaj maŝindesignistoj de la Industria Departemento de Orienta Ĉinio, laboristoj en Kiangnan-dokejo, du elektro-maŝinaj fabrikoj kaj la Ŝanhaja Povo-kompanio.

* * *

Laboristoj en Ŝanhajaj ŝtataj porcelanbakejoj jam sukcesis manufakturi grandajn altkvalitajn silicibrikojn—antaŭe importitaj el eksterlando—kio estas grava materialo por konstrui la murojn de blovfornoj.

* * *

Laboristoj en la ŝtata Azia Ŝtaluzino de Ŝanhajo jam sukcesis produkti altrapidecan ŝtalon, altkvalitan alojon de tungsteno kaj krom-ŝtalo, uzatan por fabriki tornilojn, boriolojn kaj kanelilojn. Ĝi jam montris bonegajn kvalitojn ambaŭ por hardeco kaj streĉforto.

La Homoj sur Korsin-stepo

—Molasinf (Interna Mongolio)—

Sensaciaĵo okazis sur la Korsin-stepo en aŭgusto.

La subiranta suno estis fine englutita de la malproksima vasta tero. La nordokcidenta vento ŝtele incitis ondumadon sur la herboj kaj la stepo transformiĝis en tumultantan maron. Nigraj nuboj kolektiĝis sur la firmamento densdense, kvazaŭ nigra bova felo estus etendita superkape. Ĉiuj sciis, ke la stepa aŭtuna pluvo baldaŭ venos.

Sajenkova venis pelante bovaron el malproksime. Ŝi rajdis sur granda ruĝa ĉevalo kaj post ŝi sekvis ŝia amata ĉashundeto. Ĝia nomo estis Glu. Kien ajn iris la mastrino, ĝi ĉiam kuris antaŭ aŭ malantaŭ la ĉevalo.

La bovaro paŝis pene en la ventego, sed Sajenkova ankoraŭ opiniis, ke ĝi iras tro malrapide. Ŝi klakis senĉese per la vipo kaj kriis: "Hot! hot!" Sed kiel la bovoj povis kompreni, ke ilia mastrino tiel malbone traktas ilin pro tio, ke hodiaŭ ŝi havas rendezuon kun junulo?

Sajenkova pelis la bovaron al sabla duno ne malproksima de la vilaĝo, ekhaltigis sian ĉevalon kaj vokis plurfoje: "Sangbu! Sangbu!" post kiam ŝi longe ĉirkaŭexploris la stepon per malespera rigardo. Tamen ŝi vidis nenium kaj aŭdis nenian respondon. Ŝi restigis la bovaron sur la duno kaj atendis Sangbu-n en la ventego.

Post nelonge, palblanka ĉevalo algalopis kiel sago el la oriento, la koro de Sajenkova forte ekbatis kaj rido ekfloris sur ŝia vizaĝo. Ŝi desaltis rapide de la ĉevalo kaj prenis el la sino rozkoloran tabak-saketon kun pendantaj rubandoj. Ŝi svingis per ĝi super sia kapo por varme bonvenigi la venanton. Sed dum la alia venis ĉiam proksimen, ŝia entuziasmo malkreskis iom post iom.

Ĉar la venanto ne estis Sangbu, kiun ŝi atendis.

Jen maljunulo kun vangharoj haltigis sian ĉevalon antaŭ Sajenkova.

"Kion vi faras ĉi tie, knabino?" La maljunulo bone sciis, kial ŝi estas ĉi tie, sed demandis malicete.

"Maljuna avo, kion urĝan vi havas, ke vi kurŝvigitis la ĉevalon eĉ sur la oreloj?" Ŝi forturnis la paroltemon per evitema respondo.

"Plej urĝan taskon. Mi iras disdoni la sciigon pri la alvoko al amaskunveno."

"Vespere post la kunveno, daŭrigu ankoraŭ la nefinitan rakonton de hieraŭa vespero!"

"Neeble verŝajne. Ĉu mi ne diris, ke mi havas urĝan laboron?"

"Kian urĝan laboron! Konfesu malkaŝe, ke vi simple ne volas rakonti."

"Estas vero. Mi ne mensogas. Nu, mi foriras. Hejmeniru frue, knabino! Tiel do."

La maljunulo ekpiedbatis kaj la ĉevalo ekgalopis.

La nomo de la maljunulo estis Amogulang. Li estis vilaĝestro kaj krome veterana partiano. Li estis honesta kaj bonkora. Por la popolanoj, li estis ĉiam la unua preni sur sin la penan laboron kaj la lasta ĝui la feliĉon. Tial la amaso fidis kaj amis lin. Ĉiuj gejunuloj en la vilaĝo salutis lin "Avo Amogulang."

Post la foriro de Amogulang, Sajenkova ekmaltrankviliĝis: "Kial Sangbu ankoraŭ ne alvenis? Oĉjo Amogulang ĵus diris, ke li havas urĝan laboron, kio okazis tamen en la vilaĝo?"

Tondran sonon alportis la nordokcidenta vento kaj ĉe la malproksima ĉielorando ekfulmis kun ora brilo: minacis pluvego. Sed ŝi jam promesis rendezuon al sia amato, ŝi ne povis ne ĝisatendi.

Tiel longe, longe atendis Sajenkova.

"Bonan tagon, kamaradino! Bonvole diru al mi, kiel nomiĝas la proksima vilaĝo?"

Mallaŭta, obtuza voĉo aŭdiĝis post ŝia dorso. Ŝi turnis sian kapon kaj vidis viron, malgrasan kiel flava ŝafo, staranta antaŭ ŝi. Liaj longaj haroj taŭziĝis kvazaŭ centoj da longvostaj pedikoj nestus en ili. Ŝvito postlasis striojn sur lia polvo-kovrita varioldifektita vizaĝo; Li volvis sin en flava felto. La neatendita gasto vekis en Sajenkova fortan suspekton kaj ŝi demandis kun konsterno:

"Kiu vi estas? Kaj de kie vi venas?"

"Mi estas el Zarud Standardo, ĉar tie okazas malŝatego." Li intence ne diris sian nomon.

"Kien vi iras kaj kiun vi volas viziti?"

"Kiam mi venis ĉi tien, Malaha de nia vilaĝo petis min transdoni buŝan informon al Glasen de Peinŭentur-otok*, Korsin Standardo. Bonvolu diri al mi, kiel malproksime de tie ĉi estas Peinŭentur-otok?" Li rigardis ŝin per siaj ratecaj okuloj atendente respondon.

Sed la vortoj Glasen de Peinŭentur-otok vekis grandegan suspekton en Sajenkova: Glasen de nia vilaĝo foje servis en la "kapitulaca trupo" sub Kuomintang kiel pelotonestro kaj nun estis metita sub severa supergardo, en la vilaĝo. Kial tiu suspektindulo ĝuste demandis pri tiu suspektinda nomo? Dum longe Sajenkova ne respondis. Kaj Glu, la apud ĉi staranta ĉashundeto, ankaŭ streĉis siajn orelojn kaj fiksrigardadis la fremdulon.

"Kie vi loĝas en Zarud?"

"Alatangaŭpaŭ-otok." Li aldonis haste post paŭzeto: "Sed mi baldaŭ transloĝiĝos, ĉar tie estas terura sekeco. Ĉu vi scias, kiel malproksime de tie ĉi estas Peinŭentur-otok, kamaradino?"

"Peinŭentur-otok? Tre proksime," ŝi diris trenparole. "Sed en Korsin-Strandardo ekzistas regulo: ĉiu pasanto devas montri sian dokumenton, antaŭ ol li havas la rajton informiĝi pri la vojo; kaj nur tiel oni estas permesita diri al li la veran vojon."

"Ho!" li ridetis ruze. "Dokumento? Jes, mi havas. Sed kiam mi forlasis la hejmon, timante, ke mi perdus ĝin survoje, mia edzino alkudris ĝin firme sur mia kalsono. Estas ne oportune ĝin tuj elpreni. Nu bone, jen vesperiĝas. Mi havas longan vojon antaŭ mi kaj devas iri rapide. Ĝis revido!" Parolante li retiriĝis.

Sajenkova forte maltrankviliĝis, vidante lian foriron. Ŝi bone sciis, ke tiu estas suspektinda sed ne trovis pretekston por lin haltigi. Ŝi pensis: "Inter mongoloj ekzistas proverbo: kiu lasas la lupon foriri estas krimulo de la stepo. Se mi malkovras suspektindulon, mi ne

povas lasi lin foriri facile." Cetere ŝi pensis: "Avo Amogulang ja diris: 'Urĝan laboron mi havas, kaj ankaŭ vi, knabino, hejmeniru frue...' Kion tio signifas?" Ideo ekfulmis tra ŝia cerbo kaj ŝi postkuris rapide.

"Bonvolu atendi momenton, kamarado!"

La suspektinda ulo haltis kun malvigleco.

"Jam estas malfrue kaj pluvos verŝajne. Ni estas ja same popolanoj. Kiu ne vojaĝas iam? Venu al mia hejmo por trinki teon kaj iom ripozi!"

La ulo silentis kaj levis sian kapon por rigardi la ĉielon, kvazaŭ li meditus pri io. Ĝuste en tiu momento la nordokcidenta vento eklevis la flavan felton, kiun li surportis. Sajenkova ekremis tutkorpe kvazaŭ elektrite—brilanta pafifaŭko montriĝis sub la angulo de la felta kovrilo de la suspektindulo.

Nun ŝi estas certa, ke tiu ne estas bona homo. Ŝi pensis: "Mi nepre devas konduki lin al la vilaĝo per ĉiaj klopodoj. Ne, neeble, la malamiko estas ruzega kaj suspektus mian intencon—tiam estos malfrue. La ulo rigardas al la ĉielo kun levita kapo kaj suspektas nenion. Mi elŝiru de li la pafilon, profitante la nunan oportunon!"

Ŝi ĵetis sin neatendite sur la friponon kaj ekkaptis lian pafilon. La fripono turnis sin kaj luktis furiozege kun ŝi. Sed la pafilo estis firme kaptita de Sajenkova. La du homoj interluktis neapartigeble.

Neellasante la pafilon, Sajenkova kriegis tiel laŭte kiel eble:

"Venu kapti la kontraŭrevoluciulon!"

Ŝi kredis, ke tiamaniere ŝi alvokos la vilaĝanojn. Dume Glu, la ĉashundeto, ankaŭ alkuris por helpi sian mastrinon kaj mordis la friponon je la vizaĝo kaj manoj, ke ili estis kovritaj de freŝa sango. Vidante ke li forte embarasiĝas sub la duflanka atako, Sajenkova tiris la manon, kiu kaptis la pafilon, kun plena forto kaj la pafilo estis elŝirita. Pro kolero kaj senkonsileco, la fripono forte piedbatis ŝin je la flanko. Ŝi eksentis doloregon, sed ŝi komprenis, ke jen estas la vivgrava momento kaj ŝi devas ne fali antaŭ la kontraŭrevoluciulo; ŝi retiriĝis baraktante kelkajn paŝojn kaj retenis sin de terenfalo.

La hundo estas la plej sentema besto sur la stepo. Dumtempe, la hundoj de malproksima vilaĝo estis surprizitaj kaj ekbojis furioze. La fripono maltrankviliĝis ankoraŭ pli forte kaj pensis en si: "La pafilo estas forprenita kaj la vilaĝaj hundoj alkuros grandare. La mongolaj hundoj ne lasos min iri libere. Estas pli bone forkuri ĝustatempe." Li saltis sur la grandan ruĝan ĉevalon de Sajenkova. La ĉevalo estis surprizita kaj forgalopis sub la premado de liaj kruroj.

La pafilo, kiun Sajenkova akiris, estis ĉeĥe fabrikita. Ŝi nur havis la sperton uzi ĉaspafilon kaj neniel povis movi la ĉanon de tiu pafilo. Pro maltrankviliĝo ŝi kuris post li nur kelkajn paŝojn kaj falis teren. Sed la malgranda Glu atingis lin, alsaltis kaj mordis la ruĝan ĉevalon je la postaj kruroj. Tiu lasta piedbatis freneze kaj la fripono estis forĵetita je konsterniĝo. Li tuj leviĝis kaj ne havante la tempon por rekapti la ĉevalon li forkuris piede lasante la felton post si. La malgranda Glu persekutis ankoraŭ kelktempe sed ĉesis, kiam ĝi vidis, ke la mastrino ne sekvas.

Dum la lastaj tagoj la fripono tranoktis sur la stepo, en la dezerto aŭ sur la kampoj kaj ne satmanĝis eĉ unu fojon; cetere la ĵus okazinta akra batalo ekscitis lin supermezure, ke li sentis iom da kapturiniĝo, kiam

li apenaŭ transpasis la sablodunon. Li forkuris kiel eble plej rapide. Kaplevante li ekvidis antaŭ si fragmitan marĉon. En la duonhela krepusko fragmitaro ondumis en la ventego kiel tumultanta maro. Li ekhaltis momente, ekprenis kun vigleco skatoleton da alumentoj el la sino kaj kuris al la fragmita marĉo.

* * *

Kiam la malgranda Glu kaj la granda ruĝa ĉevalo kuris returne al ŝia flanko, Sajenkova apenaŭ leviĝis nebulmense. Ŝi pensis: "Kvankam mi elŝiris de li la pafilon sed la fripono forkuris. Tio estas same hontinda kvazaŭ oni revenus de ĉasado kun lepora haro sen la leporo!"

Ŝi kliniĝis kaj kuntiris la brovojn, palpante la ĉeĥe fabrikitan pafilon. Krak! la ĉano subite cedis. Ŝi saltis pro ĝojo. Forgesante siajn lacecon kaj doloron, ŝi saltis sur sian ĉevalon kaj direktiĝis norden kun la malgranda Glu post si.

Ŝi ekflaris iom da fumodoro tuj post kiam ŝi pasis la sablodunon. Ho! Antaŭ ŝi etendiĝis fajromaro! Ŝi haltigis la ĉevalon stultiĝante. Grandaj ŝvitgutoj ruliĝis malsupren laŭ ŝiaj vangoj. Kio ja okazis?

Sub la pelo de la norda ventego la furioza flamo eligis surdigan muĝadon kaj krakadon. Estis ja mezaŭtuna sekega fragmitaro! Eĉ la sovaĝaj anseroj ne povus traflugi!

Kvankam Sajenkova staris ĉirkaŭ duon-lion for de la incendio, sed nubo da nigra fumo sufokis ŝin tiel, ke ŝi apenaŭ povis spiri libere, kaj ŝia vizaĝo doloris ĉe la bakado de la arda flamo. Sed kiel estiĝis tiu stepa brulego? Ŝi tute ne komprenis.

La fragmitaro estas la trezoro de la stepo. Nur dank' al ĝi la najbara loĝantaro havigas al si ĉiujare tolonojn, mongolajn botojn, teon kaj diverskolorajn silkojn. Ankaŭ troviĝas aliaj, kiuj kalkulas je ĝi, por akiri al si la tutjaran manĝprovizon. Nun ĝi fariĝis jam fajromaro! Ofte diras la mongoloj: "Sovaĝeja fajro estas la fatala malamiko de la stepo!"

"Certe estas la ĵus forkurinta fripono, kiu bruligis. Sed li miskalkulis, tio estas neeble!" Tion konsiderante ŝi vipis forte sian ĉevalon kaj ĵetis sin sentime al la flamego.

Furioza flamo kaj densa fumo kuniĝis en purpuran fajrozono kaj komencis ŝin ĉirkaŭsieĝi. Sed la sola penso kiu ŝin okupis estis: "Trakuru! trakuru! Ne lasu la kontraŭrevoluciulon forkuri!" Ŝi iom kliniĝis kaj vokis: "Glu!" La ĉashundeto saltis sur la dorson de ŝia ĉevalo. Sajenkova timis, ke la fajro brulvundos ĝin dum la trakurado, do ŝi kaŝis ĝin en la sinon kaj enfaldis per la antaŭa refaldo de la robo. La fajreroj komencis flirti super ŝia kapo. Ŝi vidis klare, ke ĉe la okcidenta flanko troviĝas loko, kie la fajrozono montriĝas malpli larĝa. Ŝi decidis ke ŝi trapasu tra tiu loko. Ŝi malstreĉis la bridrimenon kaj la granda ruĝa ĉevalo ĵetis sin kontraŭvente en la fajrozono. Subite ŝi kvazaŭ falis en kaldronon kun bolanta akvo. Malheliĝis antaŭ ŝiaj okuloj kaj ŝi tuj perdis konscion.

La granda ruĝa ĉevalo trakuris kiel freneza lupo la fajromaron larĝan je 50-60 futoj. Sajenkova svenis senforte sur la ĉevaldorso. Bruliĝis la kaptuko kaj fumis la tutkorpa vestaĵo. Ankaŭ la haroj kaj haŭto de al ĉevalo brulkarboniĝis kaj freŝa sango gutis ĉe ĝia buŝo. Kvazaŭ simpatiente al sia mastrino, ĝi malrapidigis la paŝojn kaj iris kapklinante. Sed kiu atendis, ke ĝi jam ne plu povas iri en tiu kriza momento?

Giaj antaŭaj kruroj eksurgenuis, la kapo ĵetiĝis antaŭen kaj ĝi falis sur la brulnigrigitan herbejon.

Noktiĝis, kaj la vento malfortiĝis. Sajenkova ek-sentis freŝecon kaj vekigis, kvazaŭ ŝi demetus de si peltan jaketon en la mezsomero kaj saltus en riveron. Ŝi malfermis senforte la okulojn, kaj tuj refermis. Sed, kiam ŝi ekmemoris, ke ŝi estas ĉasanta kontraŭrevolu-ciulon, ŝi tuj rektigis sin kaj levigis. La peza ĉeĥe fabrikita pafilo pendis ankoraŭ sur la maldekstra man-radiko. Nur tiam ŝi eksentis doloron sur la vizaĝo. Ŝi palpis iomete kaj trovis ion malvarmetan. Estis ja freŝa sango, kiu ruĝigis ŝiajn fingrojn. Ŝi pensis: "La granda ruĝa ĉevalo brulvundiĝis kaj mi mem ankoraŭ sentas kapturton. Preferinde estus forsendi unue Glu-n. Ŝi ellasis Glu-n el sia sino.

"Iru for!"

La malgranda Glu desaltis de la ĉevalo tute ne vundite kaj forkuris rekte laŭ la mastrina instrukcio.

Poste ankaŭ Sajenkova desaltis de la ĉevalo, estingis la fajrerojn sur la korpo kaj iom ordigis la vestaĵojn. Ŝi levis la ĉevalon per la bridrimeno kaj trotigis ĝin kelkajn paŝojn. Ŝi denove surĉevaliĝis kaj galopis en la senliman stepon kaj la senliman nokton.

Pluvogutoj komencis fali de la peĉenigra ĉiela kupolo kaj frapis la herbopintojn susurante.

* * *

Sangbu hodiaŭ iris en la urbon por hufoferi al la ĉevalo kaj revenis pli malfrue ol ordinare. Li sciis, ke Sajenkova jam atendis longe, tial li eliris tuj post kiam li manĝis duonpelveton da kaĉo. La blanka ĉevalo, kiun li rajdis estis nomata 'Leporeto'. Ĝi paŝis rapide kaj firme kaj baldaŭ venis al la sabloduno. Sed tre strange! kie estis Sajenkova? Oni eĉ ne vidis ŝian ombron! "Ĉu ŝi rompas sian promeson, la petolemu-lino?" Li levis la vipon malgraŭvole kaj iris serĉi ŝin en ŝia hejmo. Kiam li apenaŭ transpasis la sablodunon, li ekvidis en la nordo densan fumon kov-ranta la teron kaj furiozan flamon atinganta la ĉielon. Li tuj forlasis la intencon rendevui kun Sajenkova, tur-nis la ĉevalon kaj galopis al Avo Amogulang por raporti al li la akcidenton.

Enirinte la vilaĝon li tuj kriegis: "Okazas brulego en la nordo! en la fragmitmarĉo! Ĉiuj iru kaj estingu la brulegon!"

Tiumomente Avo Amogulang ĵus kunvokis la popol-amason al kunveno kaj estis anoncanta al ĝi urĝan ordonon.

"En la ĉi-vespera kunveno mi volas sciigi al vi aferon sed unue mi legos al vi la ordonon de la 'standarda*' buroo de publika sekureco." La maljunulo komencis legi la ordonon per obtuza kaj basa voĉo:

De la Popola Registaro de Dungnutuk Gaĉa:

Ordono venis hieraŭ de la Liga Buroo de Publika Sekureco por serĉaresti kontraŭrevoluciulon Paŭlu. La supre menciita krimulo aliĝis al Kuomintang en 1947, kaj servis en la Kuomintanga kavalerio de kapitulaculoj kiel vic-batalionestro. Li tiranis en Alukersin-standardo kaj rabis de la popolanoj pli ol 500 ĉevalojn, 700 bovojn kaj 3000 ŝafopn. Li seksoperfortis pli ol 20 virinojn. Lia abomeninda krimago vekis ekstreman indignon inter la popolanoj. Kiam nia armeo liberigis Alukersin-standardon, li alinomiĝis kaj rifuĝis al x-eli, x-nutuk, Zalud Standardo por entrepreni longedaŭran kaŝitan movadon... Ekde la subpremo al la kontraŭ-revoluciuloj, li timis, ke lia krimago estus malkovrita*

kaj eskapis la 15an de la kuranta monato. Jen lia fizionomia trajtaro:

.....

Kiam Amogulang spiris post la finlego de la oficiala anonco kaj komencis doni simplan klarigon al la amaso, Sangbu pafiĝis en la kunvenejon spiregante kiel dujara ĉevalo. La amaso estis stultigita.

"Okazas stepa brulego, Avo Amogulang!"

"Kio, stepa brulego!?" La tuta amaso en la halo estis ekscitita.

"Kie okazas brulego? Parolu pli klare, Sangbu?" demandis Amogulang.

Kiam Sangbu donis detalan informon al Amogulang, la homoj sidantaj sur la terlito stariĝis kaj kelkaj el tiuj, kiuj staris ĉe la sojlo jam iris eksteren.

"Stepa brulego"—kian impreson tiuj du simplaj vor-toj donis al la homoj! Kiomfoje stepa brulego okazis en la pasinteco! Domoj kaj trezoroj cindriĝis, bovoj, ŝafoj kaj kameloj estis brulmortigitaj sur la stepo... Sed post la liberigo, ĉie fondiĝis fajrobrigadoj, kaj oni metis la kontraŭfajran taskon en la patriotan pakton. Tial ne plu estiĝis stepa brulego jam tri-kvar jarojn. Nun aŭdiĝis subite tiu terura nomo, kiel oni povis ne konsterniĝi!

Finaŭskultinte la raporton de Sangbu, Amogulang kuntiris maltrankvile la densajn brovojn, faris kelke da paŝoj tien reen kaj turnante sin subite kriis al la amaso kvazaŭ li ekmemoris pri io:

"La hodiaŭa kunveno provizore fermiĝu, ni iru unue estingi la fajron. Ĉiuj tuj iru hejmen por pretigi la ilojn kaj kuniĝu tuj ĉe la maljuna ulmo ĉe la orienta fino de la vilaĝo kiam eksonoros la sonorilo. Tiel do!"

La amaso disiĝis.

Amogulang okazigis urĝan kunvenon inter la Gaĉa-a kadraro kaj kelkaj milicanoj. En la kunveno li parolis:

"Ne okazis brulego sur nia Korsin-stepo jam dum tri-kvar jaroj, ĉu ne? Kial hodiaŭ—ĝuste kiam ni ricevis la urĝan cirkuleron de la 'Standarda' Buroo de Publika Sekureco, estiĝas subite tiel furioza stepa brulego? Ŝajnas al mi, tio ne estas senkaŭza, tial ni devas pliakrigi nian atentemon. Tiel do."

Ĉiuj konsentis lian opinion kaj tuj stariĝis gardistoj ĉirkaŭ la vilaĝo. Amogulang elprenis krajonon kaj skribis ion en sian taglibron. Li deŝiris la folieton, faldis ĝin plurfoje kaj donis al Sangbu, dirante:

"Portu tiun ĉi leteron al Nutuk—petu kvitancon."

Kaj li diris al alia milicano:

"Iru sonorigi la sonorilon, tiel do."

Dang! dang! dang!...

La loĝantaro de la tuta vilaĝo rapidis kuniĝi ĉe la maljuna ulmo. Troviĝis viroj, virinoj, maljunuloj kaj infanoj kiuj ĵus formetis sian lernolibron. Iuj portis ŝovelilojn, aliaj malsekigitajn feltojn sed la plejmulto balailojn.

Duon-li-on for de la fajrozono troviĝis monteto en la formo de amaso da bova fekaĵo. Amogulang staris sur la monteto kaj svingis per la mano, kaj la homoj haltis unu post la alia. Tiam Beiĵe, la maljunulo, kiu plialtis ol la amaso je unu kapo, vidis ke la pluvo ĉiam pligrandiĝas, murmuris kvazaŭ preĝante: "Kiam vi soifas tiel, ke viaj stomako kaj intesto fumas, vi trovos pirarbaron; kiam sur la stepo okazas brulego, la norda vento alportos pluvegon."

(daŭrigo sur p. 208)

La Usonaj Imperiistoj Ne Batalas por Ideo

Karaj ĉinaj gekamradoj,

Elkoran dankon pro ĉio, kion vi sendis: Esperanto-libroj, belaj afiŝoj, fotografiaj kaj anglalingvaj broŝuroj kaj dokumentoj pri la abomena agado de la imperiistoj.

Unue mi volas menci, ke nia Esperantista Packomitato jam antaŭ longe sendis fortan proteston kontraŭ la bakteria milito kaj al la Usona legacio (en sveda lingvo) kaj al Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (en Esperanto). Ni sendis la jenan tekston:

“La packomitato Esperantista de Stockholm decidis transdoni fortegan proteston kontraŭ la terure barbara milito en Koreio, kie oni dum preskaŭ du jaroj jam misuzis la nomon de OUN por kaŝi la plej abomenajn militkrimojn kontraŭ senarmila loĝantaro. Ni esprimas nian abomenon antaŭ la perbacila kaj kemia militoj, kiuj en krudeco ne nur superas ĉiujn krimojn de la Hitlerfaŝismo sed ankaŭ povas endanĝerigi la tutan loĝantaron de la tero.

La milito en Koreio ne estas batalo pri ideoj. Antaŭ ni ĝi aperas kiel treege malkuraĝa kaj senrespekta murdado, kiun komencis kaj daŭrigas individuoj, kiuj jam antaŭ longe perdis la kredon je sia propra estonteco. Laŭ nia opinio la solvo de Koreia demando estas tre simpla: Retiru ĉiujn eksterlandajn militfortojn kaj lasu la Koreian popolon mem ordigi siajn aferojn. Tiu solvo sendube kontribuas al la plifortigo de la paco en la mondo.”

Tia protesto estis unuanime aprobita en nia komitato. Eble ke la esprimo: “La milito en Koreio ne estas batalo pri ideoj.” Ŝajnas al vi iom stranga. El pure marksista vidpunkto oni ja devas diri, ke ĝi estas la batalo inter du mondsistemoj. Sed ne estas necese, eble eĉ ne oportune rigardi ĝin tiel. Ŝajnas al mi malfacile percepti la fakton, ke *homoj* povas esti tiaj monstroj, ke ili tiel volas defendi siajn ideojn, kiel faras la Usonaj banditoj. Per aliaj vortoj: *la Usonaj imperiistoj ne kredas je la vivkapablo de tiu ideo, kiun ili laŭdire volas defendi kaj disvastigi.* Ĉar se ili kredus je ĝi, ili ne bezonus amase murdadi la loĝantaron, sed ili povus provi disvastigi ŝian “bonan ideon” inter vivantaj homoj. Do, ili ne batalas por ideo, sed estas simplaj amasmurdistoj.

Nun mi finas kaj tutkore salutas vin!

via Gustav Nilsson. Svedio

Usono Faras Tiel en UNO Kiel en Ruĝa Kruco

Karegaj amikoj,

Koran dankon pro la tre multe kaj tre valoraj materialoj pri la bakteria milito (fotoj, broŝuroj kaj afiŝoj) kiujn mi ricevis de vi. Mi cirkuligis la materialon kiom eble plej vaste por disvastigi la scion pri la faktoj. Proksimume cent homoj jam vidis kaj baldaŭ miloj vidos la Usonajn hontindaĵojn. Unue mi disdonis ilin inter miaj propraj gekonatoj kaj inter intelektuloj kiuj ankoraŭ ne povas kaj ne volas kredi eĉ la plej fortajn pruvilojn. Sendube vi bone komprenas ke ĉe ni la situacio estas iom alia ol ĉe vi.



La bravegaj aziaj popoloj spertis kaj spertas jam longe la skurĝon de la “okcidenta civilizo.” Multaj ĉe ni ne povas kredi ke la gvidistoj en Usono estas kompletaj faŝistoj, kiuj uzas senskrupule la plej fiajn, la plej malhomajn armilojn provante ekstermi milionojn da “kolorhaŭtuloj.” Tamen antaŭ ĉi tio iom post iom la ĉielo klariĝas pro la politiko, kiun Usono faras tiel en UNO kiel en “Ruĝa Kruco.” Mi menci la rifuzon de Usono kaj aliaj imperiistaj ŝtatoj malpermesi atomajn, bakteriajn kaj aliajn amasmurdilojn. Ankaŭ jam montriĝis ke la Internacia Ruĝa Kruco-Komitato tute ne estas internacia, sed konsistas el nur svisaj reakciuloj, kiuj eĉ ne volis kondamni la hitlerajn amasbuĉejojn Auswitz, Dachaŭ ktp. Kaj ĉi tiun “objektivan neŭtralan” komitaton la militfaristoj el Wall Strato volas uzi por pruvi “ke la ĉinoj, koreanoj kaj ĉiuj pabatalantoj mensogas”, kaj ke Usono en nomo de la UNO ne uzas la bakterian armilon. Se ne estus serioza kaj grava afero, tiam estus ridinde. La Nederlanda reakcia gazetararo serpentumas kvazaŭ venena vipero ĉar la rifuzo de la Usona registaro subskribi la konvencion de

Genevo pri amasmurdiloj kuŝas kvazaŭ ŝtonego en ĝia stomako.

Ru Bossong

Mi Deziras Saluti Ĉiun el Vi!

—letero al korea batalanto
Cung Zunghau—

Kara kamarado,

En la plejlasta n-ro de “El Popola Ĉinio”, mi legis leteron de vi skribitan. Mi sentas devon skribi al vi. Bonvole pardonu, se mi tro trudas min.

Kamarado, mia koro estas tiel plena de admiro por la batalantaj landoj: Koreio kaj Ĉinio, ke mi estas kvazaŭ devigata iel esprimi miajn sentojn al almenaŭ unu el vi, la defendantoj de la paco.

Amiko! Kvankam mi ja scias ke vi ne bezonas ian ajn kuraĝigon en via granda tasko, tamen mi sentas ke plezurigos vin scii ke ĉi tie en Aŭstralio troviĝas miloj da pacamantoj kiuj elkore honoras vin kaj rigardas vin kiel heroajn defendantojn de via patrio kaj ankaŭ de la tutmonda paco.

Kun honto kaj indigno ni devas konfesi ke nia reakcia registaro kunligas sin al la Usona sango-kovrita milit-maŝino kiu volas treni nin en la abismon. Sciu, kamarado, ke via batalado donas al ni kuraĝon kaj esperon. El mia koro mem, mi sendas al vi fratajn salutojn kaj mi volas certigi al vi ke ankaŭ ni, la pacamantoj de Aŭstralio, faros nian tutan eblon en la batalo por paco.

Kiel ege mi deziras, se estus eble por mi, persone saluti ĉiun el vi! Bedaŭrinde, tion mi ne povas. Sed mi petas al vi, amiko, parolu al viaj kamaradoj pri miaj salutoj kaj bondeziroj. Tio ege plezurigos min, se ankaŭ viaj kunbatalantoj aŭdus miajn vortojn!

Ankoraŭfoje bonvole pardonu, ke mi tiel trudas min al vi. Mi konscias, ke en la soldata vivo oni ofte trovas malmultan libertempon. Pro tio, mi ne atendas respondon de vi. Tamen, se vi dezirus respondi, via letero estos bonvenigata. Memoru, ke mi en Aŭstralio sufokiĝas en maro de mensogoj kaj malespero. Kuraĝigaj vortoj de kamaradoj hardigas nian volon. Pro la “fera kurteno” konstruita de la kapitalista ĵurnalaro, malfacile estas informiĝi pri koreaj aferoj. La ĉitieaj porpacaj ĵurnaletoj ĝojus presigi leterojn el Koreio.

Nun mi finas la leteron, ankoraŭfoje esprimante al vi kaj al viaj koreaj kaj ĉinaj kamaradoj plej elkorajn salutojn kaj bondezirojn.

Edward Kelk, Aŭstralio

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) *Sendi al ni 4 ekzemplerojn* de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la *jurnalo aŭ gazeto*, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

La Red.

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

Aŭstralio: (1) **Steve Bennett**, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park, N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)

(2) (por abono:) **A. Keesing**, G. P. O. Box 4886, Sydney.

(3) (por aĉeto:) **Current Book Distributors**, 40 Market Street, Sydney, NSW.

Aŭstrio: **Antonio Balague**, St.-Pölten, Kirchenweg 12. (Jarabono 20 schilling-oj)

Belgio: **Walraevens Rajmundo**, Rabelais Strato, 10, Bruselo. (Poŝtekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)

Britlando: **F-ino F. Paraige**, 10 Woronzow Road, St. John's Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)

Bulgario: (1) **Bulgara Esperantista Kooperativo**, Sofia—Str. TRI UŜI, 15. (Jarabono 8 Lv.)

(2) **Ivan Kovaĉev**, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.

Ĉeĥoslovakio: **Burda Rudolf**, Plzen-palackeho N. ě. 6. (Jarabono 50 kĉs.)

Danlando: (Jarabono 6 kronoj)

Finnlando: **Nillo Kavenius**, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9. (Jarabono: 300 Fmk.)

Francio: **Labor-Esperantista Federacio** (Jarabono: Fr. F. 450)

Germanio: (1) **Helmut Löffler**, Mittweida/Sachsen, Theaterstrasse 1. (Jarabono: 6 D.M.)

(2) **Heiny Knorr**, (24) Hamburg-Wellingsbüttel, Ekerkamp 81.

Hungario: (1) **KULTURA**, Budapeŝt, V. Akademia u. 10. (Jarabono 15 forintoj)

(2) **Marton Lajos**, Bors.-u. 2, Budapeŝt, XII, (poŝtkonto 38.187)

Indonesio: **Kho Khwat Liat**, Post Box 115, Surabaya, Java.

Islando: **Siguldur Gudmundsson**, Falkagata 1, Reykjavik. (Jarabono 15 kronoj)

Italio: **Eduardo Zumbo**, Casella postale 226, Torino. (Jarabono: 400 liroj)

Izraelio: **Bencion H. Danon**, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)

Japanio: (jarabono 360 jen-oj)

Meksikio (kaj aliaj sudamerikaj landoj): **Jezevo Serrano L.**, Central de Talabareros 72, Col. E. Carranza, Mexico, D. F. (Jarabono: 5 pesoj)

Nederlando: (1) **Heroldo de Esperanto**, Harstenhoekweg 223, Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)

(2) **Esperanto-Grupo Vaals**, Pr. Bernhard-str. 4, Vaals.

Pollando: **Asocio de Esperantistoj en Pollando**, Warszawa Marszałkowska 81/32. (Poŝteka konto I—4329/113) (Jarabono 12 zl.)

Rumanio: **Rumana Esperantista Societo**, București I, Bulev. 6 Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)

Svedio: **Einar Adamson**, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 5 kronoj)

Usono: (jarabono \$1.25)

Rim: Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-kuponoj (1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj). Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno eldonata de Fremdlingva Eldonejo

26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

ENHAVO

Bildo sur la kovrilo — Junaj mongolaj rajdistoj (sceno el la Armea Sport-kunveno)

Por Paco en la Azia kaj Pacifika Regionoj kaj la Mondo.

Opaĉjo Volas Reguligi la Konton.

Komencigo de Grandskala Ekonomia Konstruado en Nord-orienta Ĉinio.

Ĉinio Forigos Senlaborecon.

Unu Tago en Akompano de Monica Felton en Pekino.

La P.L.A. Igas la Dezerton Flori.

Kaŭ Ju-paŭ, Soldato-verkisto, Rakontas Sian Historion.

La Homoj sur Korsin-stepo.